

1982 septembro
75-a jaro
n-ro 921 (9)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Du sukcesaj kongresoj en Belgio

Vi trovos,

ke ne troveblas en ĉi tiu kongresa numero la kutimaj raportoj pri: Internacia Kongresa Universitato, Esperantologia Konferenco, fakaj kunsidoj, kelkaj artaj aranĝoj, aŭkcio, balo, akceptoj, bankedo ktp. Anstataŭe, vi trovos informojn pri pluraj aliaj kongresaj aranĝoj en Antverpeno kaj pri almenaŭ tri aliaj kongresoj: junulara, blindula kaj infana. Enestas ankaŭ iom da fotoj, pluraj laŭdoj kaj ne malpli da kritikaj vortoj, en kaj inter la linioj. Se vi, aliflanke, trovos en ĉi tiu numero kelkajn teknikajn plibonigojn, preteratentojn aŭ simile, sciu ke ili povus montriĝi provizoraj. Estas ja tiel, ke la redaktoro subite kaj kaprice, post plurjara abstinenco, decidis ferii kaj minacis tion fari eĉ se la numero devus atendi ĝis decembro kaj la Zamenhofa Tago. Li do lasis la tutan teknan prilaboron al la kompatindaj oficejaj direktoroj kaj novuloj. Cetere, jen li — tiu damna redaktoro — sidas en trajno, survoje al flughaveno, kaj salutas vin de tie. Li ferios en unu el la 102 landoj de siaj legantoj. Vi komprenas kial li ne volas malkaŝi la ferilandon: li ja estas unu el tiuj, kiuj kelkfoje emas ripozi de Esperanto kaj paroli ekz. la lingvon "fluke-li". (Ni ja foje rakontos al vi pri tiu lingvo.) Fine, decas informi vin, ke ĉi tio estas la unua numero, kiun kompostis por vi nia nova ĉina volontulo Dai Song-en. Havu ankaŭ vi belan feritempon!

Enhavo

- 141 67a Universala Kongreso de Esperanto: Entuziasmo pri la tria Antverpeno (S. Milojević)
- 142 Solena Inaŭguro: Solenaĵo de modela longo
- 143 Inaŭgura parolado de M. Masmoudi: Necesas inciti la instancojn de UN
- 146 Kongresa rezolucio pri la Monda Komunika Jaro
- 147 Kongresa temo: La idealismo kaj la obstino (Humphrey Tonkin)
- 148 Kongrestemaj diskutoj: Ne kontraŭstarigi la generaciojn (Ingvar Schoultz)
- 149 Malferma solenaĵo: Fine eltrovita formulo (sm)
Kongresa rezolucio pri la Monda Asembleo pri Maljuniĝo
- 150 Muzika vespero: Debuto el Ĉinio (John C. Wells)
- 151 Teatro: Kiu decidu pri ĉefeco el abundo? (William Auld)
- 152 Unua Ĝenerala Kunsido: Procesio de opinioj (sm)
- 153 Tago de la Lernejo: Riĉa programo — ideo ripetinda (Zsuzsa Barcsay, Hermann Behrmann)
- 154 Komitato kaj Estrare (vs); Kongresa rezolucio pri Turismo; Demandoj por la Akademio
- 155 Belartaj Konkursoj de UEA 1982: Unua premio aljuĝita en ĉiuj branĉoj
Originala poezio, unua premio: La portalo de Urnes (Johan H. Rosbach)
Nova kultura fondaĵo
- 156 Esperanto-domo Antverpeno inaŭgurita; Solena Fermo: Mankis reĝisoro
- 157 19a Internacia Infana Kongreseto: Agrable en Keerbergen (Dai Song-en)
Kongreso de Blindaj Esperantistoj: Rolo de brajlo reliefigis
- 158 38a Internacia Junulara Kongreso de TEJO: Temoj por ĉies gusto (Leif Gunnar Nordenstorm)
- 159 Vesperaj aranĝoj de la IJK: Ĉiuj ja rolis tend-are (Alain Dawson)
Rezolucio de la 67a UK pri la Internacia Jaro de la Junularo
- 160 Kongreseroj... (hazarde memoritaj vinjetoj el la kongresa travivaĵo)

La kovrilo

La du kovrilaj fotoj portas al vi manplenojn da diversgeneraciaj movadaj vizaĝoj. Iuj el ili estas en Lovenio (v. paĝon 158), aliaj pozis apud Antverpeno. Tute intence, inter ili vi ne rekonos prezidantojn, direktorojn, estraranojn aŭ similulojn. Simpla movada popolo, kun eventuala ĉeesto de estontaj prezidantoj, direktoroj ktp. La Movado cetere vivas de tiu "simpla popolo", kiu pleje kontribuis al la sukceso de la du grandaj kongresoj en Belgio. Se vi ne samopinias, skribu al ni.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**
Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, via delle Cave 82/C, I-00181 Roma, Italio; tel. (06) 78 89 970.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavik, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, Fazenda Escola "Bona Espero", BR- 77260 Alto Paraíso (GO), Brazilo; tel. (061) 226 8101 (en Brasília).

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (03) 651 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; tel. 65 52 43.

Estrarano pri esploroj kaj eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 387 8288.



67a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, 1982 07 24 – 07 31:

Entuziasmo pri la tria Antverpeno

KIUN AJN ni demandis pri la 67a Universala Kongreso — de la 24a ĝis la 31a de julio 1982, en Antverpeno (Belgio) — ĉiu havis nur entuziasmajn vortojn de laŭdo. Ni ja ne sukcesis demandi ĉiujn 1899 gekongresanojn el 50 landoj, sed tamen — la ĝenerala kontento pri la 67a UK ŝajnas esti fakto. Al simila konkludo oni venas ankaŭ post trafolio de centoj da enketiloj, kiujn la kongresanoj nun resendas al la Centra Oficejo. Ĉar pleje gravas, ke ĝuste la kongresanoj kontentu, ni submetiĝu al tiu ilia juĝo kaj provu esplori ĝiajn kialojn.

La urbo ja estas tute fascina, kaj ne mirinde do, ke post la 7a UK en 1911 kaj la 20a en 1928 oni jen denove venis al la filigrane teksita flandra metropolo, riĉa je arto kaj bonfarto, arde pulsanta en kiu ajn horo de la tagnokto. La kongresaj ejoj — tiuj ĉefaj — estis komfortaj kaj ideale lokitaj en la vera koro de la urbo, apud tiu pompa stacidomo-palaco kaj preskaŭ ene de la tuta mondriĉo faŭna kaj flaŭra, ĉar la kongresejo apartenas al la antverpena Zoologia Ĝardeno.

La arta programo de la Kongreso estis nekutime abunda kaj — eble plej grave — ĝi okazis en idealaj ejoj, kiuj ankaŭ normale servas al tia celo. Ankaŭ la eduka parto de la programo proponis grandan elekton: dek prelegoj en Internacia Kongresa Universitato, pluraj sesioj de Esperantologia Konferenco, publika kunsido de la Akademio, Cseh-seminario, progresiga kurso, konversacia rondo kaj tute sukce-

sa Tago de la Lernejo. Aldoniĝis ankaŭ ampleksa pritrakto de la kongresa temo, elstara parolado de eminenta ekster-movada gasto, agrable mallongaj inaŭguraj ceremonioj, bona balo kaj riĉa bankedo. Multaj kongresanoj memoros la antverpenan kongresejon unuavice pro tiu vasta kaj komforta akceptejo, kiu facile disponigis spacon ne nur por la tradiciaj kongresaj ĝicetoj sed ankaŭ por tuta aro da ekspozicietoj. Ĝi, krome, povis facile sidigi dekojn da tiuj, kiuj serĉis iom da ripozo. Tute brila ideo estis loki la informan ĝiceton ĉe la enirejo mem kaj tie daŭre havi kompetentan deĵoranton. Nova kaj ankaŭ bona ideo estis havi apartan homon, kiu estris la kongresajn ejojn kaj rapide povis solvi amason da etaj sed ĝenaj teknikaj problemoj.

Gejunuloj havas apartan kialon por memori la 67an UK, ĉar multaj el ili — tiuj, kiuj estis aliĝintoj de la tuj poste okazonta TEJO-kongreso — povis senpage partopreni en Antverpeno. Post multjaraj plendoj, ke "mankas" junaj kongresanoj, ni trovis manieron efike logi ilin. Kvankam ni ankoraŭ ne disponas pri precizaj ciferoj, kiuj dirus, kiom da gejunuloj utiligis tiun eblecon, dum la Kongreso mem estis evidente, ke tion faris multaj, sed ne tiel multaj, ke tio finance "subfosu" la Kongreson kaj pravigu rapidan rezignon pri tiu bela paŝo.

La tria UK en Antverpeno estas memorinda ankaŭ pro la abundo da presaĵoj, plej diversspecaj, kiujn la kongresanoj trovis en siaj dokumentujoj (kiuj mem


estis apenaŭ taŭgaj) aŭ ricevadis dum la kongresa semajno. Ni aparte pensas pri la bela formo de la "Kongresa kuriero" kaj pri la granda reklamstreĉo de *Heroldo de Esperanto*, kiu enhavis la "Kurieron" kaj aperis en kvin specialaj eldonoj dum la Kongreso. *Heroldo* eventuale ne trovos financajn rimedojn kaj teknikajn facilajojn ripeti tion baldaŭ, sed ĝi bele pruvis, ke ebloj ekzistas ankaŭ sur tiu kampo. Aldone al la *Kongresa libro* venis ĉi-jare ankaŭ du apartaj broŝuroj: *Trankvile promeni. . . Agrable butikumi en Antverpeno* kaj *Etosplene amuziĝi. . . Abunde manĝi en Antverpeno*. Bele kaj utile sed ankaŭ iom lukse kaj ekscese, krom se la broŝurojn komplete pagas tiuj kelkaj komercaj reklamoj, kiuj enestas.

Mankojn la 67a UK ankaŭ havis: Kvankam la gazetaro kaj aliaj amaskomunikiloj dediĉis abundan spacon al la Kongreso, surstrate la sola signo pri la Kongreso estis niaj insignoj. Nenia flago aŭ slogantuko, krom ha-

zardaj afiŝoj en la montrofenestroj de lertaj komercistoj. Eĉ tiu unu sola afiŝpanelo, super la kongreseja pordego, "perdiĝis" tie inter reklamoj pri estontaj koncertoj kaj venontaj filmoj. Tiaj estas la leĝoj, diras belgoj. Nu, al diablo kun la leĝoj, se vere temas pri ili! Ni estas unu el la plej grandaj regulaj kongresoj en la mondo kaj ni rajtas postuli afiŝspacon en la urbo, kiu provas gajni nian gastigon.

Dum la belgaj aŭtoritatoj montris la atenditan (kaj merititan!) atenton al la Kongreso en la daŭro de la preparlaboroj, ĉe la Inaŭguro aperis preskaŭ neniue ili. En la Kongreso kun pli ol 75-jara tradicio, okazanta kvarafoje en tiu lando kaj ĉiufoje sub la Alta Protekto de la belga Reĝo, tia nereprezentigo en la Inaŭguro sonas preskaŭ kiel insulto. Nin tie salutis la diplomatoj de dudeko da landoj, sed mankis salutoj de Belgio kaj de Antverpeno.

Tamen, estas tempo, ke ankaŭ ni ĉesu ekzameni la Kongresojn kvazaŭ statistike notante, kio okazis kaj



Solenaĵo de modela longo

"KIAM EN LA JARO 1548 la juna franca presisto Plantin* decidis elmigri al la granda havenurbo Antverpeno, li faris tion, interalie, pro la fakto, ke tiu urbo elradiis ideojn de pli libera esprimebleco kaj de internacieco; libera esprimebleco pro pli granda toleremo, ĉar la internacia komerco supozas konscion pri la homa diverseco kaj akceptas ĝin; internacieco, ĉar en tiu tempo ĉefe en la grandaj havenurboj okazis kontaktoj inter diversaj kulturoj kaj lingvoj. Ne estas hazardo, ke la parolantoj de Esperanto — lingvo destinita por la internacieco — jam por la tria fojo kongresas en ĉi tiu urbo, Antverpeno."

Tiel tekstis la unuaj vortoj eldiritaj de Grégoire Maertens, prezidanto de UEA, en la Solena Inaŭguro de la 67a Universala Kongreso de Esperanto. Hazardo tamen estas — malofta kaj agrabla —, ke prezidanto de UEA malfermas kongreson en sia propra lando, kiel

* Christophe Plantin (1514–1589), fama presisto kaj eldonisto, kiu laboris ĉefe en Antverpeno (tie nun troviĝas la fama Muzeo Plantin), sed ankaŭ en Parizo kaj en Leiden (Nederlando).

okazis al la flandro Maertens en la flandra ĉefurbo Antverpeno, kiu per la 67a UK kunformas tiun ekskluzivan triopon de la solaj urboj en kiuj okazis po tri Universalaj Kongresoj — Antverpeno, Berno, Kopenhago. En la plenplena salonego, komforta kaj eleganta (sed varma), kun la granda Kongresa Flago kaj kvar palmoj kiel ornamaĵo, sekvis bonvenigo nome de la Loka Kongresa Komitato kaj prezento de la personoj sur la podio. Post agrabla muzika paŭzo, kiun plenumis la instrumenta blokvinteto "Helikon", al la mikrofono estis invitita ambasadoro Mustapha Masmoudi, la ĉefa gastparolanto en la Kongreso. La kompleta traduko de tiu franclingva parolado (pri ĝia skriba teksto disponis la kongresanoj) aperas aliloke en ĉi tiu revuonumero.

Plia muzika paŭzo antaŭis la tradician revuon de diplomataj salutoj. La Inaŭguron ĉeestis: Aŭstrio: d-ro A. Westerhof (ministeria konsilanto, kiu salutis en Esperanto); Brazilo: E. Gamaz de Magalhães (ĝenerala konsulo, kiu salutis); Ĉinio: Sun Lan (unua sekretario) kaj Chen Boxiang (tria sekretario); Danlando: Bent B. Nielsen (konsilanto, kiu salutis); Francio:

kio ne okazis, kio meritas pluson kaj kio gajnas minuson. Kiam ni faras tion, ni emas konsideri nur la planitan kongresan programon. Feliĉe, la Kongresoj ne konsistas nur el la programoj, kaj ili povas esti sukcesaj eĉ kiam la programoj malsukcesas.

En Antverpeno, kiel en ĉiu nia Kongreso, la plej gravaj estis tiuj miloj kaj miloj da nenie antaŭviditaj kontaktoj kaj konatiĝoj, tiuj centoj da neplanitaj konversacioj, tiu abundo da eksterprogramaj interkonsentoj pri kunlaboro, pri korespondado, pri interŝanĝo de opinioj, libroj, poŝtmarkoj, amleteroj kaj kisoj eĉ, tiu giganta tutsemajna praktikado de la sola vera kaj senpera internacia amikeco. Se aldone al ĉio ĉi ankaŭ la kongresa programo bone disvolviĝis, tio faras Antverpenon nur pli sukcesa en la longa vico de niaj sukcesaj Universalaj Kongresoj. Ion alian, cetere, ni eĉ ne atendis en la urbo kaj lando kun tiel fortaj loka kaj regiona movadaj organizaĵoj.

sm



Henri Delarbre (ĝenerala konsulo); FR Germanio: J. Stenglein (ĝenerala vickonsulo); Germana DR: G.-W. Ruthenberg (unua sekretario); Hungario: Irén Pehr (aferŝarĝito, kiu salutis); Israelo: Joab B. Eilon (dua sekretario, kiu salutis); Jugoslavio: Esad Cerić (ambasadoro); Pollando: Kowalski (konsilanto, kiu parolis); Portugalio: José Rebelo Coelho (konsulo); Sud-Afriko: A. Joubert (tria sekretario); Usono: Thomas Gewecke (ĝenerala konsulo, kiu salutis en Esperanto). Skribe salutis la ambasadoj de Aŭstralio, Britio, FR Germanio, Indonezio, Sud-Afriko, Svedio, Svislando, Vatikano kaj Zambio, la ĉefministro de Nov-Zelando, pluraj membroj de la Honora Komitato kaj neregistraj organizaĵoj.

Sekvis mallonga parolado de H. Tonkin pri la kongresa temo (vidu aliloke en ĉi tiu numero) kaj fermaj salutvortoj de G. Maertens. La tuta inaŭgura solenaĵo daŭris malpli ol du horojn kaj jam per tio fariĝis agrabla kaj impona. La organizantoj restudu tiun antverpenan koherecon kaj provu ripete praktiki ĝin ankaŭ estonte.

INAŬGURA PAROLADO DE MUSTAPHA MASMOUDI:

Necesas inciti la instancojn de UN

Jam de kvino da jaroj la Estraro de UEA konstruas pontojn inter la Universalaj Kongresoj kaj la ne-Esperanta mondo per invito de eminentaj gastparolantoj. Nia ĉi-jara gasto Mustapha Masmoudi estis membro de la "Komisiono MacBride" starigita de Unesko por la pristudo de problemoj de komunikado. En siaj personaj komentoj aldonitaj al la raporto de la Komisiono, li aparte emfazis la malekvilibron en la uzo de la t.n. "internaciaj" lingvoj kaj rekomendis, ke internaciaj institucioj pristudu tiun problemon. S-ro Masmoudi estis krome ambasadoro de Tunizio ĉe Unesko kaj prezidanto de la Interŝtata Kunordiga Konsilio pri Informado de la Nealiancitaj landoj.

EN LA KOMENCO de mia alparolo, permesu al mi direkti plej varman dankon al Universala Esperanto-Asocio, pro la honoro kiun ĝi faris al mi per la invito paroli en la Solena Inaŭguro de tiu ĉi Kongreso, kaj elvoki la problemon de la lingvaj malhelpoj kaj ilia rilato kun la koncepto de la nova monda komunika ordo.

En nia tempo neniuj povas nei la rolon de la lingvoj, kiel iloj de komunikado kaj instrumentoj de evoluado, kaj ankoraŭ malpli ilian kontribuon al la certigo de la kultura identeco kaj de la valoroj de la diversaj socioj. Pritraktante la problemon de la lingvoj, la Internacia Komisiono pri Studado de la Komunikaj Problemoj (CIC) de Unesko venis al la konkludo, ke lingvopolitiko devus esti konsista parto de la politiko pri komunikado, ebligante reciprokan interkompreniĝon, kio ja estas la centra funkcio de la lingvo.

Malekvilibro kaj nevenkeblaj malfacilaĵoj

Dum lingvo estas komuna al ĉiuj socioj, la metodoj de skribado kaj esprimado ne estas tiaj. La nombro de skribaj lingvoj estas taksata je 500, kaj tiu de skribaj lingvoj kun literatura tradicio je 200, el kiuj 17 estas adoptitaj de po 50 milionoj da personoj. Ĝuste en Afriko, oni trovas la plej grandan nombron de lingvoj: oni supozas ke temas pri minimume 1 250, kaj laŭ kelkaj fontoj eĉ pri ĉirkaŭ 2 000.

Plie, oni povas trovi konsiderindan nombron de lingvoj en unu sama lando: 89 en Soveta Unio. El totalo de pli ol 1 650 lingvoj kaj dialektoj en Hinda Unio, oni

uzas 15 en la administrado kaj edukado; Ganao havas 56; la indianoj de Meksikio parolas pli ol 200 lingvojn. Multaj el tiuj lingvoj estas jam en skriba formo, sed la plejparto ankoraŭ ne.

Estas evidente, ke tiu multeco de lingvoj kreas timindajn barojn por la komunikado. Aliflanke, oni devas



Ambasadoro Masmoudi: en la Komisiono MacBride li plej klare rekonis kaj elstarigis la lingvan dimension de la komunikado.

rekonu, ke la tradiciaj lingvoj gardis la riĉecon de la historio kaj la diversecon de la kulturo.

Gravas tamen noti, ke, se la multeco de lingvoj eble ne ĉiam starigis kulturajn problemojn fundamentajn, ĝi tamen starigas problemojn praktikajn, kiam temas pri disvolvado scienca kaj teknika.

La koloniigo de vastaj regionoj de la mondo ofte estigis lingvajn ŝanĝojn en multaj landoj, kune kun la progrese forigo de certaj dialektoj. Aliflanke ĝi certigis la mondan progreson de malgranda nombro da eŭropaj lingvoj.

En la ĉiaspecaj rilatoj, kaj en la internaciaj kontaktoj personaj aŭ kolektivaj, la rolo ludata fare de malgranda nombro da lingvoj ŝajnas esti esenca trajto de la komunikado de la moderna socio. Restas tamen la fakto, ke, ekster la naturaj uzantoj kaj kelkaj rondoj de erudiciuloj, centoj da milionoj da personoj en multaj partoj de la mondo vidas antaŭ si la malhelpon de lingvo kiun ili ne parolas. Ili spertas esti viktimoj de diskriminacio, pro la fakto ke la informado estas donata en la lingvoj, kiuj kongruas kun la centroj de povo, kiel ĝin mencias la raporto de la CIC. Efektive, evidentiĝas en certaj studoj ke 3/4 de la popoloj de la planedo esprimas sin en neniuj el la ĉefaj lingvoj eŭroporiginaj, nuntempe konsiderataj kiel internaciaj lingvoj.

Dume, laŭ supozoj de Unesko, pli ol 2/3 de la eldonaĵoj en la mondo estas redaktataj en la angla, rusa, hispana, germana kaj franca; kaj ĉirkaŭ 60% de la scienca komunikado uzas la anglan, kiu fakte estas la gepatra lingvo de nombro da individuoj kiu ne superas 10% de la tuta planeda loĝantaro.

Sur la internacia plano tiu malekvilibro kondukas al situacio pli kaj pli komplika en la sino de multnombraj organizaĵoj de la UN-sistemo, kie oni ne sukcesas starigi justecon inter la rekonitaj internaciaj lingvoj. Dokumentoj de pli ol unu jardeko restas ne akceptitaj kaj ne ekspluatitaj malgraŭ bonvolo kaj daŭraj klopodoj, pro manko de traduko.

En la tuta mondo, ĉiujare, dekoj da miloj da sciencaj kaj kulturaj revuoj kaj libroj estas presataj en diversaj lingvoj. Multaj temoj tie pritraktataj havas nekontesteblan intereson. Sed kiun skalon povas atingi tiu intereso en la momento kiam la enhavo de tiuj eldonaĵoj ne estas alirebla al ĉiuj.

Por nova alproksimiĝo

La nuna periodo estas karakterizata de plirapidiĝo de la tekniko, kiu estas sekvo de ia scienca eksplodo, sen antaŭo en la historio. Sur kelkaj terenoj la progresoj realigitaj de la scienco kaj la teknikaj aplikoj kaŭzis pli da ŝanĝoj en 50 jaroj ol en la jarcentoj antaŭ la nia. Dank' al la novaj informrimedoj la scienca pensado atingas pli ol iam ajn personojn de ĉiuj klasoj, de ĉiuj vivkondiĉoj kaj de ĉiuj landoj. Tiu turnopunkto estas la ĉefa fakto de nia epoko. Novaj sciencoj kreiĝas. Ĉiu scienco diversiĝas. La sciencfakoj intermiksiĝas. La amaso kaj la komplikeco de la al homoj necesaj konoj pli kaj pli kreskas. Nu, teknikaj inventaĵoj ebligas nun — se iuj kondiĉoj estas plenumitaj — kultivi, ekzemple, en kvarona horo unu hektaron da tero, dum antaŭe necesis ne malpli ol 150 horoj.

Estas nerefuteble ke sole novaj labormetodoj ebligis tiajn sukcesojn. Kelkaj sciencesplorantoj demandas al si: kial ne okazas same pri la lingva komunikado? La evoluo de la lingvo, kiel instrumento de komunikado, povas draste ŝanĝi ĉiujn donitaĵojn de la aktualaj problemoj, kaj ebligi al la individuo plivastigi en nemezureblaj proporcioj siajn konokampojn, kaj komuniki kun la eksterlando multe pli facile. Tiel ili pensas.

Se la nuna muzika notaro estas kvazaŭ universala — tiel pensas interlingvistoj —, tio estas, ĉar ĝi posedas la



La ĝenerala konsulo de Usono (s-ro T. Gewecke) kaj la dana ambasada konsilisto (s-ro B.B. Nielsen) aŭskultas klarigojn de d-ro W. Solzbacher (maldekstre) kaj s-ro P. Bagger.

kvalitojn postulatajn de universala lingvo: la precizeco, la reguleco kaj la facileco de kompreno. Al ĉiuj naciaj aŭ regionaj muzikoj ĝi ebligas esti skribitaj en sia propra stilo, per la samaj rimedoj, restante legeblaj kaj kompreneblaj de ĉiu muzikisto.

Nepre oni devas rekonu, ke la televido — per la transsendo de la bildo — mallongigis la vojon inter la komu-

numoj kiuj ne parolas saman lingvon, multe pli ol la radio aŭ la gazetaro faris tion. Sed tiu forta komunikadrimedo ne povis solvi la tuton de la problemo. La esplordirekta sinteno de la lingvistoj konsistas en la serĉado de la vera solvo aliloke, se almenaŭ oni volas pli alten levi la intelektan nivelon de plej granda nombro da personoj, kaj permesi al ĉiuj akiri instruadon kaj malkovri la diversajn aspektojn kaj la multajn facetojn de la homa kulturo.

Por atingi tiun celon, kaj se oni celas kiel eble plej bonan utiligon de la intelektaj kapabloj de ĉiuj viroj kaj virinoj de la tero — tiel ili asertas — estas necese krei komunikan instrumenton, laŭ scienca tipo, kiu ebligas ekonomie disvastigi kaj stoki plej grandan kvanton da informoj.

En la erao de la komunikadsatelitoj, tiu lingvo — laŭ ĝiaj iniciatantoj — ne povas esti alia ol universala. Ĝi devas adaptiĝi al la dialektika tendenco de la individuo, kaj apelacii pli la rezonadon ol la memoron por sia komprenebleco, tiel ebligante la akiron de la maksimumo per la plej malgranda streĉo. Sole tia lingvo povas respondi al la postuloj de la daŭre evoluanta scienco kaj sammaniere forigi la malfacilaĵojn, kiujn kaŭzas la kreado de novaj sciencaj terminoj, kaj realigi grandan ŝparon de studado kaj energio dank' al la unuformigo de la rimedoj de instruadoj scienca kaj teknika.

La bremsoj kaj handikapoj

Plejparte la interlingvistoj rekonas, ke, se de post 1629 — jaro en kiu Descartes en letero al Patro Mersenne montris la ĝeneralajn liniojn de universala lingvo — neniu artefarita lingvo kapablis trudi sin kiel internacia lingvo, la kaŭzo estas ke la antikvuloj kaj la modernuloj provis inventi internacian lingvon de okcident-eŭropa origino, por uzo de sole la okcidentaj popoloj, kvankam necesis krei lingvon kiu estus universala instrumento de komunikado kaj informado. Unu el la kaŭzoj de tiu malsukceso estas, ke la nocioj de lingvo kaj de parolado ne estis klare difinitaj kaj limigitaj, tiel ke la lingvistoj ne povis ekstrakti sukcese lingvon kiel ilon de komunikado kaj informado, kaj sekve ne povis serĉi racian solvon por la mekanismo de vortoformado, kaj simpligi la komplikaĵojn de la gramatiko.

Sed tiuj tezoj ne akiras unuanimecon. Nuntempe, laŭ kelkaj, universala lingvo estas utopio. Laŭ aliaj ĝi estas vizio de la spirito. La parolantoj de la angla, kiuj ĝojas pro la kreskanta supereco de sia lingvo kaj aplaŭdas ke la plimulto de la eldonaĵoj aperas en tiu lingvo, certe ne estus pretaj kompromisi kaj kunlabori al la suprenigo de universala lingvo, kiu superus la anglan. La franclingvanoj, malkontentaj pro la invadanta evoluo de la lingvo de Shakespeare, deziras redoni per ĉiuj rimedoj al la lingvo de Descartes ĝiajn diplomojn de nobeleco kaj ĝian privilegian lokon en tiu internacia koncerto. Kion diri pri la germanoj, fieraj pro sia ekonomia kapablo kaj sia kultura identeco; kion diri pri la japanoj, kiuj ne ĉesas mirigi la mondon per siaj teknologiaj bravaĵoj; pri la ĉinoj kies releviĝo jam pensigas la

tutan mondon; pri la rusoj kaj pri la slavaj popoloj, egale ĵaluzaj rilate la konservadon de siaj propraj lingvoj? La araboj, kvankam konsciantaj la gravecon de la problemo, ne estas pretaj forgesi siavice, ke ilia lingvo en la pasinteco servis al la transportado okcidenten de la sciencaj konoj kiuj ebligis la prestiĝan evoluon, kiu nun estas okcidenta. Ili opinias ke ilia lingvo, freŝdate rekonita kiel sesa lingvo internacia, povas rekonkeri la perditan terenon. Sed, pro la malfacilaĵoj — kaj solidaraj speciale kun la popoloj afrikaj, aziaj kaj latin-amerikaj — ili deklaras neniun malamikecon kontraŭ ĉiu solvo progresiga. Sed, la individualismo de

Esperantlingva parto de la parolado de Mustapha Masmoudi:

Jen la rimarkoj, kiujn ŝajnas utile prezenti antaŭ la nuna granda forumo. Mi alportas nenion novan; pri tio mi konscias, ĉar la malekvilibro, la malordo kaj la anarkio je la lingva nivelo estis la komenca punkto de viaj motivoj kaj de la agado, kiun vi ne ĉesis senlace evoluigi jam preskaŭ cent jarojn.

Mi ankoraŭ ne estas esperantisto, sed mi kredas je la taŭgeco de grandaj iniciatoj similaj al la via. Mi esperas, ke Esperanto kaj ĉiuj personoj kiuj laboras por la sama celo, fine trovos favoran eŭon en la sino de la internaciaj organizaĵoj, alportante sian kontribuon al ordiĝo de la lingvaj problemoj, kiuj ofte troviĝas ĉe la origino de la manko de internacia kompreniĝo. Via Asocio meritas la respekton kaj konsideron de la tuta homaro.


tiuj, la utopio de tiuj aliaj, efikis nur kiel pliaj komplikaĵoj en la serĉado de rimedoj kapablaj radikale ŝanĝi la nunan situacion.

Anstataŭ kunigi siajn iniciatojn, harmoniigi siajn klopodojn kaj serĉi la apogon de koncernaj internaciaj organizaĵoj — kun la celo konvinki la mondan opinion pri la neceso meti la problemon de la lingvoj sur la internacian scenejon —, por poste proponi kiel unu el la eventualaj solvoj la kreon de universala helplingvo, kelkaj interlingvistoj obstine faris proponojn kiujn ili ne kapablis disvastigi en la mondo kaj adoptigi fare de la diversaj socioj. Tion farante ili metis sin en la situacion de tiuj, kiuj obstinas meti la plugilon antaŭ la bovon.

Pro la modesteco de la atingitaj rezultoj, iuj klopodis trovi solvon alimaniere. Kelkaj, fine, akceptis la superregon de la angla, submetiĝante al la plenumita fakto; ili eĉ proponas konsekri tiun lingvon kiel universalan komunikilon. Tamen, ili sugestas — por havigi al ĝi iun kadron de specifa evoluo — eviti, ke anarkismaj ŝanĝiĝoj infektu ĝin sekve de la geografiaj influoj tra la tuta planedo.

Aliaj inklinas pensi, ke la naturaj lingvoj devos cedi la lokon al la lingvoj pri specialaĵoj. Konsekvence, ili bonvenigas la naskiĝon de nova erao kiu vidigas la unuigitajn provojn de specialistoj pri diversaj disciplinoj

sur solidaj bazoj krei iun kodon, por ebligi la transiron de unu lingvo al alia, je nivelo de tiu specialaĵo, sen ia hiato. Inter ili ne malmultaj eĉ pensas ke tiu sektora kodigo povus en sia evoluo veni al kodigo unika kaj universala, taŭga por ĉiuj specialaĵoj. Ankoraŭ aliaj, fine, salutas la eksterordinarajn teknikajn progresojn



kaj iliajn nelimititajn eblecojn, kiujn la apliko ofertas. Ili opinias ke la mirakla solvo kuŝas en la fono de la komputilo mem, kiu estas vokita iĝi la interpretisto fidele kaj ĉiama, en ĉiuj lingvoj, kaj por ĉiuj specialaĵoj.

Rolo de la internaciaj organizaĵoj

Ĉiuj tiuj hezitoj, tiuj revoj kaj tiuj rezervoj, kompreneble influas la diskutadon pri lingvaj problemoj je la nivelo de la internaciaj organizaĵoj en kies kadroj la komplekseco de la problemoj sentiĝas pli kaj pli. Tial la konkludoj kaj rekomendoj estas markitaj de singardemo kaj timemo. Intertempe la problemoj daŭrigas sian altrudon. La interregistara konferenco pri la komunikad-politikoj, okazinta en Afriko en 1980, parte elvokis tiun delikatan problemon. Siaflanke, la komisiono de S. MacBride (CIC) atentigis, ke la nacioj en stadio de disvolviĝado kaj la multlingvaj socioj devas ellabori lingvajn politikojn, kiuj faciligas la progreson de ĉiuj naciaj lingvoj, eĉ se estus necese elekti unu aŭ plurajn inter ili por pli larĝe servi sur la terenoj de komunikado, de supera instruado kaj de administrado.

La komisiono manifestis sian fidon je la teknologio kaj opiniis, ke ĝi povas, per aŭtomata tradukado, helpi por venki la lingvajn malhelpojn.

Tiuj konkludoj ne tute kontentigis kelkajn membrojn de la komisiono kiuj je la fino de la raporto, ree levis — inter la problemoj kiuj postulas pli profundan studadon — la problemon de la lingvaj baroj kaj la malekvilibron en la uzado de la internaciaj lingvoj.

Mi mem diris, en la aldonoj de la sama raporto (v. p. 347), ke la internacia kunlaborado estas esence fondita sur reciproka komprenado, ke la disvastigo de la scienca pensado uzas pli ol iam antaŭe la novajn komunikajn rimedojn. Nu, la lingvaj baroj estigas daŭran malhelpon al tiuj nemalhaveblaj faktoroj de paco kaj progreso, kaj la malekvilibro inter la lingvoj uzataj sur larĝa internacia skalo ne ĉesas kreski. Konsekvence, oni invitu la internaciajn instancojn al studado de la adekvataj solvoj, kiuj povus kontraŭagi tiun situacion, kaj al la serĉo de novaj sciencaj iloj de komunikado, kapablaj stoki kaj disvastigi per plej ekonomiaj rimedoj plej grandan amason da informoj.

Efektive, se oni rifuzas la arbitrecon kiun ni toleras hodiaŭ, kaj se ni samtempe rifuzas al la informado la rajton trudi al ni elektronikajn formulojn sen antaŭa akordiĝo, necesas inciti la koncernajn instancojn de Unuiĝintaj Nacioj al plej diligenta pripensado de la problemoj de la internaciaj lingvoj, por difini novajn elektelecojn kaj por proponi novajn direktojn. Atentu, se tiuj organizaĵoj ne sufiĉe konsciiĝos pri la problemoj, la teknologio akaparos ĉion kion oni lasos al ĝi, sen ajnaj zorgoj pri la veraj bezonoj de la uzantoj.

En tiu kadro Unesko povus ludi elstare pozitivan rolon, prilaborante la donitaĵojn objekte, profunde analizante la evidentajn problemojn kaj serĉante avangardajn solvojn, por — fine — identigi tiujn, kiuj povas helpi la popolojn komuniki kun si mem tra la historio kaj kun la aliaj tra la spaco. Tio estas granda provo kiu manifestas sin en la kadro de la antaŭenigo de la komunikado kaj de internacia komprenado, kiuj hodiaŭ estas necesaj por la gardado de la paco tiel akre minacata.

Mustapha Masmoudi

Rezolucio pri la Monda Komunikada Jaro

La 67a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 24a ĝis la 31a de julio 1982 en Antverpeno kun 1899 reprezentantoj el 50 landoj

notas kun kontento, ke la jaro 1983 estas deklarita de la Asembleo de UN "Monda Komunikada Jaro: Evoluigo de Substrukturoj";

konsideras, ke la evoluo de komunika teknologio povas kaj devas servi la demokratian informinterŝanĝon en la servo de la homa progreso internaciskale;

konstatas, ke la flankoj de komunikado teknika kaj socia ne estas disigeblaj, sekve

rekomendas al organizaĵoj interesitaj en komunikado doni pli da atento al la sociaj kaj lingvaj dimensioj de la internacia komunikado;

subtenas en tiu senco la aktivecon de Unesko, kaj taskas al UEA — surbaze de aparta laborplano — kunlabori kun interesitaj neregistaraj organizaĵoj por komune konscii la mondan publikon pri la lingvaj aspektoj de komunikado kaj konvinki pri tio la instituciojn, kiuj evoluigas la Mondan Komunikadan Jaron, speciale la Internacian Telekomunikacian Union kaj Uneskon.

La idealismo kaj la obstino

Kvin diversaj kunvenoj traktis la kongresan temon en Antverpeno. Unue H. Tonkin en la Inaŭguro faris la enkondukan paroladon, kies teksto sekvas. Tri apartaj kunsidoj okupiĝis pri la junularo, pli aĝaj personoj kaj mezaĝuloj. Fine, la Dua Ĝenerala Kunsido provis resumi la tuton. Ni aperigas sur la posta paĝo la plej interesajn demandojn, kiujn levis la antverpenaj diskutoj pri la kongresa temo — "Generaciaj aspektoj de la Esperanto-movado".

NIA KONGRESO koincidas kun unu granda okazaĵo kaj anticipas alian. En la nunaj tagoj en Vieno kunvenas Monda Asembleo pri Maljuniĝo, en kiu Unuiĝintaj Nacioj ekzamenas la problemojn de maljunaj homoj. En 1985, oni festos Internacian Junularan Jaron, laŭ decido de Unuiĝintaj Nacioj. Per tiu observo oni esploros la situacion de junaj homoj kaj ilian socian rolon. Tiuj du gravaj aranĝoj rekte rilatas nian kongresan temon, "Generaciaj aspektoj de la Esperanto-movado".

Ni rigardu unue la maljunulojn. Pri la kresko de la nombro de maljunaj homoj en la socio ni ĉiuj konscias. Pro rapida progreso en la medicino, la higieno, eĉ la nutrado, ĉie en la mondo la homoj vivas pli longe kaj pli longe ĝuas plenajn fortojn. En multaj landoj falas la aĝo de pensiĝo, tiel ke kreiĝas granda grupo da homoj, kiuj bezonas siajn apartajn sociajn servojn, sed kiuj samtempe povas tre utile kontribui al la socio laŭ diversaj manieroj.

Due, ni ĵetu rigardon al la junuloj. Kresko de la nombro de junuloj ja ne okazas en la industriaj landoj. Malgraŭ tio, ekonomiaj kondiĉoj estas tiaj, ke senlaboreco inter gejunuloj estas ofte granda problemo. En evoluantaj landoj, tamen, la proporcio de junuloj en la socio estas tre granda, kaj eĉ tie kie la nombro de naskoj ne kreskas, pli da homoj travivas la infanecon. Tio kaŭzas grandajn streĉojn ĉe la edukaj instancoj. Aldoniĝas la manko de teknike edukitaj homoj por kreskanta industrio, la problemo de migrado al la urboj, la kreiĝo de junulara kulturo. Plej grave, la homoj de la juna generacio vivas en mondo rapide ŝanĝiĝanta. Ĉie en la mondo la iamaj studprogramoj devas esti adaptitaj al la novaj bezonoj de ekonomie, teknike kaj kulture interligita mondo. La homoj de 1915 aŭ de 1940 kapablis grandskale perturbi la mondon, sed ĝi eltenis. Tiuj de 1982 kapablas detrui ĝin. La industrio de antaŭ cent jaroj kapablis malpurigi la vivkondiĉojn de urboj kaj regionoj. Nun tiuj minacoj fariĝis mondskalaj.

Se ni volas esplori la problemojn de maljunaj homoj kaj de junuloj, ni unuavice komencu per nia propra medio. Ni estas anoj de unika lingva komunumo, tutmonde disvastigita. Kiaj estas la demografiaj aspektoj de nia Movado? Ni rimarkas dupolusan aĝdistribuon: multaj junuloj, multaj maljunuloj, relative malmultaj homoj en la meza generacio. Kial la gejunuloj ne restas en la Movado? Versajne multaj forfalas ĉar ili ne trovas adekvatan kontentigon de siaj idealoj. Aliaj elfalas pro familiaj aŭ profesiaj devoj. Kiel ŝanĝi tiun situacion? Kiel teni alte kaj firme tiujn idealojn de la gejunuloj? Kiel porti Esperanton en la familian kaj profesion vivon de la mezaĝuloj?

Estas unu afero teni la jam konvinkitajn esperantistojn aktivaj, sed alia esenca demando estas la vastigo de la nombro de homoj, kiuj uzas Esperanton. Kian rolon ĝi povas ludi por riĉigi la vivon de junaj homoj? Ĉu ĝia idealo de kompreniĝo en egaleco ne havas ion tre gravan por diri al la civitanoj de morgaŭ, kiuj vivos en mondo kie kompreniĝo kaj reciproka respekto estos pli bezonataj ol iam ajn antaŭe?

Kaj, ĉu Esperanto ne ebligas al maljunaj homoj tranĉon de tiu kateneto, kiu dum jaroj ligis ilin al ilia profesio, al iliaj lokaj devoj? Maljunaj homoj havas la tempon vojaĝi, la tempon ĝui aliajn kulturojn kaj lerni pri ili. Sed malfacile ili lernas lingvojn. Tamen, inter la lingvoj Esperanto estas la plej facila. Ĝi estas lernebla kaj uzebla de maljunaj homoj. Kiel ajn oni rigardas ĝin, Esperanto estas kultura fenomeno kaj eduka rimedo brile utila al junaj homoj kaj al maljunaj, al homoj ĉe la sojlo de la kariero kaj al homoj apud ĝia fino. La ekstera mondo bone notu la potencialon de Esperanto por igi la vivon pli utila, pli riĉa, pli integra, por ĉiuj homoj el ĉiuj generacioj.

Se temas pri la Esperanto-movado mem, maljunaj homoj havas la tempon kaj la sperton por efike dediĉi sin al la laboro. Foje oni malpacienas pri la granda, eble eksterproportia rolo de maljunaj homoj en nia Movado. Kial? Oni per tiaj pensoj eraras. Maljunaj homoj donas al ni tiun kontinuecon, tiun sindediĉon, tiun obstinon, kiujn nia miriga socia Movado bezonas. Ili estas esenca elemento en nia agado. Kaj se temas pri junuloj, ili alportas novajn ideojn, novajn formojn de organiziĝo, novajn kulturajn valorojn. Sed se gejunuloj fondadas niajn instituciojn, maljunaj homoj daŭrigas ilin. Se gejunuloj alportas ideojn, ofte maljunuloj realigas ilin. La forto de nia Movado kuŝas en nia kapablo utiligi la talentojn de ĉiuj homoj, junaj kaj maljunaj, en la agado por Esperanto. La idealismo kaj la obstino, la novaj ideoj kaj la forto persisti — ĉio ĉi alportis nian Esperanto-movadon ĝis la hodiaŭaj tagoj, ĝis tiu ĉi Kongreso, ĝis ĉiam pli hela estonteco. Jen, do, la mesaĝo por Unuiĝintaj Nacioj: Ni pretas, nia lingvo pretas, kaj iom post iom la socio kaj la sociaj bezonoj pretiĝas por la Internacia Lingvo.

Humphrey Tonkin

Ne kontraŭstarigi la generaciojn

ĈU GEJUNULOJ meritas la subtenon kiun ili ricevas de la cetera Movado? Ĉu ili havu decidrajton? Ĉu specialaj junularaj renkontiĝoj kaj revuoj tro apartigas gejunulojn de la cetera Movado? Kiajn rolojn plenumu la diversaj aĝogrupejoj? — Tiaj demandoj leviĝis en la diskutoj pri la kongresa temo.

Diversaj aĝogrupejoj havas tre malsamajn vivmanierojn kaj interesojn. Gejunuloj devas konstrui sian vivon, trovi identecon kaj vivmedion — kaj ili ne estas tre spertaj. Tial, kun vigla eksperimentemo ili volas serĉi kaj provi novajn vojojn. Iliaj organizaĵoj kaj agadoj montras grandan inventemon — kaj ili ne estas tre stabilaj.

Maljunuloj kutime hezitas eksperimenti, eble pro negativaj spertoj. Ĉar multaj el ili opinias ke stabileco estas tre grava, ili ofte ne volas cedi postenojn kaj respondecetojn al senspertaj, eksperimentemaj gejunuloj.

En meza aĝo, multaj devas zorgi pri profesia kariero kaj kreskanta familio. Tre okupita, oni ne povas dediĉi sin plene al movada laboro. La Movado emas postuli de siaj aktivuloj multe da tempo kaj energio. Por liberiĝi de tiu konstanta, forta premo, por havi ian trankvilon en la privata vivo, multaj mezaĝuloj preferas tute lasi la Movadon.

Kiel do kunvivu tiuj diversaj grupejoj, kun siaj malsamaj vivmanieroj kaj postuloj?

Pro la tre aparta vivstilo de la junularo, multaj diskutantoj opiniis necesa, ke gejunuloj povu labori memstare en propraj grupejoj. Tie ili povas krei la medion, kiun ili preferas, realigi novajn projektojn kaj akiri spertojn. — Tamen, tiaj junularaj grupejoj ne estu izolitaj. Ili bezonas financan subtenon, kaj ili povu ĉiam konsulti la pli spertajn, pli maljunajn agantojn.

Eĉ se ekzistas apartaj junularaj sekcioj, en la ĝenerala Movado estas bezonata intima kunlaboro inter homoj el ĉiuj aĝogrupejoj. Diskutantoj de ĉiuj aĝoj opinias, ke tia kunlaboro estas necesa. Sed, kion faru gejunuloj, se ili opinias, ke la tradicia agado estas nesufiĉa, ke necesas aldoni novajn agadojn por ke la afero progresu, kaj la establitaj funkciuloj rifuzas lasi al la gejunuloj decidrajton kaj respondecon?

Leviĝis la demando, ĉu la junularo meritas la subtenon kiun ĝi ricevas de la cetera Movado (senpagaj revuoj, favora kondiĉo de membriĝo kaj aliĝo al kongresoj ktp). Ĉu tio estas bona investo de la limigitaj monrimedoj? Unu argumento ĉi-rilate favora al la junularo estas la malgranda nombro de gejunuloj en la Movado. Al la demando, ĉu la junularo sufiĉe laboras por meriti subtenon, rilatas ankaŭ la demando, ĉu la establitaj funkciuloj permesas al gejunuloj labori kaj uzi rimedojn laŭ sia propra konvinko.



Se ni efektive volas, ke novaj fortoj aktivu en la Movado — diris diskutanto — ni memoru, ke homoj bezonas senti, ke oni fidus ilin. Oni bezonas labori iagrade memstare, kaj sperti respondecon, eĉ kiam oni faras siajn unuajn paŝojn.

Ne nur gejunuloj demandas sin, kion ili faru en nia Movado, kiu frontas tre diversajn taskojn. Devus esti eble trovi por ĉiu agema homo iun taskon, kiun li aŭ ŝi ŝatos. Kiel dividi la taskojn inter la aĝogrupejoj? Ekzemple: kontaktoj kun oficialaj instancoj prefere estu prizorgataj de maturaj kaj spertaj homoj, dum gejunuloj pli taŭgas en ĝenerala publika informado. Troviĝas ankaŭ multaj homoj, de ĉiuj aĝoj, kiuj plej volonte sidas trankvile en amika rondo kaj plenumas rutinajn laborojn.

Multaj homoj malaperas el la Movado, kiam ili atingas mezaĝon. Necesas zorgi ke homoj en la periodo de transiro inter generacioj trovu bonan kialon resti en la Movado. Necesas atenti pri la reagoj de homo, kiu komencas senti, ke li aŭ ŝi ne plu apartenas al la junulara medio. Ĉu eble la junularo mem kreas tiun problemon, restante tro apartigita de la cetera Movado? TEJO agnoskas ke estas ĝia tasko faciligi tiun transiron.

Multaj mezaĝuloj devas dediĉi tre grandan parton de sia energio al la profesia laboro. Se oni — aldone — havas edzon aŭ edzinon, kaj infanojn, restas malmulte da tempo por aktivigi en la Movado.

Plej malfacila verŝajne estas la situacio de homo, kies edzo aŭ edzino ne tre interesiĝas pri Esperanto, sed deziras — aŭ postulas —, ke la libertempo estu dediĉita al la familio. Laŭ multaj diskutantoj, la Movado devas lerni respekti la bezonon de libertempo kaj privata vivo de homoj, kiuj volas kontribui al la agado, sed ne havas multe da tempo. Necesas trovi por ili taskojn, kiuj ne estu tro temprabaj.

Ĉu eblus doni al la gvidado kaj al la laboro tian strukturon, ke kunlaboremaj homoj el ĉiuj aĝogrupejoj, kun siaj diversaj bezonoj, povu efike kunlabori? Unu parolanto menciis sistemon kiu en lia klubo forigis la bezonon de subita transdono de gvidado kaj respondecoj al pli juna generacio, kio por multaj koncernatoj povas esti malfacila kaj dolora. Ĉe li, oni ĉiam elektas junulon kiel prezidanton, kaj la sekretario ĉiam estas pli maljuna, sperta aganto, kiu kapablas bone trakti interalie bankajn kontaktojn kaj administrajn demandojn.

Diskutantoj atentigis pri la fakto, ke la kondiĉoj tre varias de loko al loko. La eblaj solvoj dependas de la loka situacio. Tial gravas, ke tiu ĉi diskuto ne restu ĉi tie, sed pluiru al asocioj kaj kluboj. Se ni sukcesas, ne kontraŭstarigi sed intime kunlaborigi aktivulojn el ĉiuj aĝogrupejoj kaj medioj, ni povos efike eluzi kaj harmoniigi la sciojn kaj spertojn de matureco kun la entuziasmo kaj ideemo de juna aĝo.

Ingvar Schoultz

MALFERMA SOLENAĴO:

Fine eltrovita formulo

POST plurjara eksperimentado, ŝajnas nun, ke oni trovis la ĝustan formulon por tiu bela revuo de la salutantoj de la landaj asocioj, kiun oni dum la lastaj jaroj preskaŭ volis forigi. Nun tamen montriĝas, ke ĝuste tiu parto de la malferma solenaĵo en Antverpeno estis sen diskute la plej bela kaj la malplej temporaba parto de la Malfermo. Ni volas havi samstilan prezentigon de la landaj asocioj ankaŭ dum la estontaj Kongresoj!

La Malfermo — sub la prezido de Baldur Ragnarsson — havis ankaŭ malĝojaneron ĉi-foje: per mallonga parolado la prezidanto de UEA petis la kongresanojn omaĝi la memoron pri prof. Fuĝio Egami, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, mondfama biokemiisto, forpasinta la 17an de julio en Tokio. (Nekrologo pri prof. Egami aperos en nia oktobra numero.)

Alia omaĝo estis pli serena kaj koncernis la 75-jaran jubileon de la antverpena Esperanto-klubo "La Verda Stelo", kiu estis la ĉefa gastiganto de la Kongreso.

Apartan dankon oni esprimis al la familio de la antaŭnelonge forpasinta usona (belgdevena) esperantistino Germaine Chomette — unu el la kongresaj salonoj portis ŝian nomon —, pro la valorega donaco al la Biblioteko Hodler de UEA: tri ekzempleroj (diverslingvaj) de la Unua Libro el 1887, pluraj korespondantoj de Zamenhof kaj liaj familianoj kaj deko da aliaj valoregaj eldonaĵoj el la unuaj jaroj de Esperanto.

La kutima parolado de la prezidanto de UEA provis bildigi al la kongresanoj — inter kiuj tamen estis multaj membroj de UEA — la nunan staton de la Asocio, preparojn por la Jubilea Jaro kaj la lingvan problemon en Eŭropa Komunumo. Preskaŭ ĉiujn ĉi

Rezolucio pri la Monda Asembleo pri Maljuniĝo

La 67a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 24a ĝis la 31a de julio 1982 en Antverpeno kun 1899 reprezentantoj el 50 landoj.

notas, ke samtempe kun la Kongreso, en Vieno okazas Monda Asembleo pri Maljuniĝo, kunvokita de Unuiĝintaj Nacioj; informas, ke lige al tiu asembleo kaj por kontribui al ĝi, la Kongreso donis apartan atenton — al la problemo de maljuniĝo, speciale pri la situacio de pli aĝaj personoj en la Esperanto-movado, — al la kontribuo, kiun la Internacia Lingvo Esperanto povas doni por la pliriĉigo de la kultura vivo de maljunaj personoj;

substrekas, ke la maljunuloj troviĝas en unika socia situacio pro la progreso de la medicino, kiu plilongigas ilian atendeblan vivodaŭron, tiel ebligante al ili aktive agadi interne de la propra socio sen profesiaj devoj kaj samtempe plue kleriĝi kaj edukiĝi;

konstatas, ke la maljunuloj en la rapide ŝanĝiĝanta mondo estas je unu flanko certgrade izolitaj sed aliflanke disponas pri aparte valoraj vivospertoj, kiujn ili devus povi transdoni al aliaj generacioj;

atentigas, ke tiu generacio tute aparte povas kulture riĉigi sian vivon pere de la Internacia Lingvo Esperanto, kiu pro sia relativa facileco kaj tutmonda disvastigiteco unike taŭgas por esti utiligata de la maljunaj homoj;

invitas

- la instancojn de Unuiĝintaj Nacioj, de Unesko kaj de aliaj internaciaj registaraj organizaĵoj daŭre okupiĝi pri la problemoj de maljunuloj,
- la organizaĵojn okupiĝantajn pri la problemoj de maljunuloj kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio pri utiligo de Esperanto por faciligi al la organizaĵoj la internacian komunikadon kaj por riĉigi la vivon de la maljunuloj,
- la Landajn kaj Fakajn Asociojn kontribui al la realigo de ĉi tiu rezolucio.

temojn ni regule traktas en la revuo kaj ni pro tio ĉi-foje ne aperigas fragmentojn el tiu parolado.

Inter la skribaj salutoj, kiuj estis anoncitaj dum la Malfermo (de kelkaj neregistaraj organizaĵoj, landaj asocioj kaj pluraj unuopuloj), ni volas aparte mencii unu: venis telegramo kun bondeziroj de Teo Jung, Honora Membro, kiu malgraŭ sia aĝo (li estos 90-jara en decembro), kelkajn semajnojn antaŭ la Kongreso aliĝis pagante kelkoblon de la kotizo favore al diversaj bonfaraj celoj.

La Espero, fine de la malferma solenaĵo, sonis bele kaj vigle, gvidkantita de Londona Esperanto-Horo, kiu kontribuis ankaŭ al la programo de la Interkona Vespero kaj kiu laŭ sia kvalito meritis pli da atento en niaj kongresaj programoj.

sm

Debuto el Ĉinio

ĴAŬDON okazis la Muzika Vespero en formo de ses programeroj: du instrumentaj kaj kvar kantaj.

Unue venis la Kvarteto Arriaga (Belgujo), kiu ludis arĉkvarteton de J. C. de Arriaga. Komenci la Muzikan Vesperon per tia ĉambromuziko estis riske, pro la bedaŭrindaj kvalitoj de kongresa aŭskultantaro. Daŭre dum la delikata violonado envenadis malfruuloj (inter kiuj unu estrarano de UEA kaj pli ol unu akademiano). Iliaj geamiko, jam en siaj sidlokoj, svingis manon aŭ siblis por montri al la malfruuloj kie sidi. Ne mankis fotofulmoj. Kraketadis la plastaj sakoj entenantaj kongresajn dokumentojn aŭ aĉetaĵojn el la libroservo. Okazis tondra aplaŭdo — kompreneble — post ĉiu movimento de la arĉkvarteto. La muziko estis ja ĉarma, sed kiel ĉambromuziko ne tre taŭga por tiel granda aŭditorio kaj tiukaraktera aŭskultantaro.

Poste sekvis ĉina kantistino, Qiu Zimin: juna artistino el la Pekina Kant- kaj Danc-Ensemblo, laŭdire dum unu jaro esperantistino. La aŭskultantoj ŝatis la ideon, ke la programo enhavu ankaŭ tian, por multaj ekzotikan, kantistino, sed (laŭ mia sondado de la opinioj) ofte ne povis kapti la vortojn de la kantoj. Kaj por eŭropanoj la rigidaj gestoj kaj senvaria voĉdinamiko de la ĉina tradicio ne ĉiam kreas favoran efikon. Tamen la juna kontralto meritas gratulon pro sia bona debuto en Esperantujo. Oni aparte aprezis ŝian bis-kanton (kiu estis ja germana, ne ĉina).

Veselin Damjanov estas jam bone konata de la esperantistoj, kaj kiel kutime lia kantprezento estis precize ĝusta por kongresa aŭskultantaro. Tute ĉesis la tusado, kiu ĝis tiam aŭdebladis. Li kantis ariojn el operoj kaj operetoj interalie de Mozart, Gounod kaj Lehar. Kiel bis-kanton li prezentis (ankoraŭfoje) sian propran verkaĵon, "Krokodiloj".

Sekvis paŭzo, tiom pli bonvena pro la manko de klimatizo en la jam ŝvite preta aŭditorio. Poste sekvis alia bulgara kantisto, la tenoro Prodan Prodanov. Lia kantelekto estis pli ambicia ol tiu de Damjanov, sed malpli sukcesa. Kvankam lia voĉo estas bela, li ŝajnis ne komforta pri la propra korpo kaj ne sciis kion fari per la piedoj. Eble li kutimas kanti ne sola, sed kun opera ensemblo.

Franca pianistino Françoise Chevrier ludis propran komponaĵon, "Memoraĵo el Hispanujo". Denove aŭdiĝis tusado, sed ŝi sukcesis eviti, ke oni aplaŭdu en la mezo.

Laste venis la Ĉambra Miksita Koruso el Bulgarujo, gvidata de Dimitr Terziev. (Tre miksitaj estis ankaŭ

iliaj kostumoj: la viroj de la Koruso ŝajne forgesis pri uniformo.) Ok virinaj voĉoj kaj kvar viraj prezentis bulgarajn kaj Esperantajn kantojn, parte akompanate de John Brownlee (Britujo, akordiono), parte senakon pane. Ilia voĉdinamiko estis tre bona, kaj la kantado estis vigla kaj vigliga. La sopranoj havis problemeton ĉe la plej altaj tonoj, sed krom tio ĉio estis en ordo.

Piana akompanisto tra la tuta vespero estis Kristiaan Van Ingelgem. La anoncistino — aparte forte laŭdata de tiuj, kies opinion mi sondis — estis Katia Lödör.

John C. Wells



Supre maldekstre: Ĉina kantistino, Qiu Zimin, kiu prezentis sep kantojn dum la muzika vespero. Supre dekstre: Hungara pupteatristo Roberto Bánky kaj la prezentaĵo "Pupmiksaĵo". Meze: Herceg Csilla kaj K. Szabó rolas en "Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l'Profeto?" de János Elem (foto kopirajta: Fejer Zoltán, Hungario). Sube: Solen' kaj Arno Lagrange (La Krizalidoj) bildigas al ni gesinjorojn Pito en la teatraĵo "La evento".



TEATRO:

Kiu decidu pri ĉefeco el abundo?

INTER miaj kongresaj dokumentoj mi trovis belan kaj ampleksan broŝuron, kiú prezentis ĉiujn artajn programojn de la Kongreso. Tio estis la unua agrablaĵo. La dua estis, ke la Kongreso disponis pri unu profesia teatro dum la tuta semajno, tiel ke la multnombraj teatraj programoj povis prezentiĝi en eminente taŭga loko (kaj ne en iu loko improvizita en tute maltaŭga ĉambro aŭ halo). Dank' parte al tiuj du faktoj, la arta programo de la Kongreso estis sendiskute la plej sukcesega, kiun mi iam ajn spertis.

Sed kompreneble ni devas danki pro tio ankaŭ la altan kvaliton de ĉiuj prezentaĵoj. Mi klopodis ĉiujn teatraĵojn ĉeesti, kaj mankis al mi verŝajne nur la pupteatro

de Roberto Bánky (Hungario), pro samtempa kunsido de la Akademio, kaj do pri ĝi mi ne povas skribi.

Por mi la semajno do komenciĝis per *La evento* de Guy Foissy, esperantigita de Arno Lagrange, kiu kune kun Solen' formis la aktoran duopon de la trupo "La Krizalido". La rolantoj perfekte sentigis al ni la filistrecon de la vivmaniero de ges-roj Pito, apenaŭ inter si komunikiĝantaj, dependanta ĉefe de televidspektado. Kiam la aparato paneas, ili sukcesas amuziĝi per gapado al murdo sur la strato okazanta (kvazaŭ sur la ekrano). "La Krizalido" estas gratulinda pro tio, ke ĝi samtempe ridigis kaj iom timigis nin per la malpleneco de tia ekzistado.

Alia franca trupo, "Tespa" (Michel Audibert, Sylvie Bonnet, Sylvaine Bourrelly, François Lo Jacomo), mardon matene majstre prezentis la faman dramon *Sen eliro* de Jean-Paul Sartre, en traduko de Roger Bernard. La dramo havas sian lokon en la infero, kiu montriĝas ĉambro, en kiu tri (po tri?) pekintoj pasigos kune la eternecon, sen alia distraĵo krom turmentado de si kaj unu de la aliaj. Frostotremiga estas la perspektivo, ĉiam denove ripetadi dumeterne gurdadon de la propraj pekoj kaj malfortecoj: fizikaj torturiloj estas superfluaj. Audibert, en la rolo de Garcin, estis eminenta; la du virinoj apenaŭ malpli. Tiu kompetenta aktoro, Lo Jacomo, ĉi-foje kontentiĝis per senmanka plenumo de la malgranda ĉambриста rolo.

Kabaredo de "La Ruza Kruĉo" (Parizo) — Anna Lazarus, Armelle Le Quint, Sergjo Sire, Laŭrenco Septier, Ĵak Le Puil — devis okazi dum la Balo, sed necesis rapide nuligi ĝin, kiam evidentiĝis, ke en tiu tute ne taŭga halego kaj pro diversaj flankaj bruoj ilia intima materialo ne povis aŭdiĝi. Feliĉe ili havis okazon prezenti sian programon poste en la teatro, kaj tio estis elstare amuza, kun skeĉoj, kantoj, ŝercoj kaj deklamado. Mi neniam forgesos, ekzemple, tiun samurajon, kiu mendis glason da vino, aŭ la frenezulon, kiu deklamis propran poemon. Plaĉa estis ankaŭ skeĉo satiranta la t.n. ĉefteatraĵon de la kongreso (vd. sube), ĉar satiro estas iasence vivsango de vivanta kulturo. Eminentaj, inter tiom da talentoj, estis la deklamado de Armelle Le Quint kaj la kantado de Ĵak Le Puil.

Antaŭ la kabaredo mi havis la plezuron spekti la duan prezentadon de Junulara Pupteatro Bharato, el Kalkuto. Tiu ĉi programo estis agrabla serio de kvazaŭaj baletoj: de papilioj kaj floroj, de fiŝoj en akvo, de najo kaj flutisto, k.s. Ĝi havis sian specialan belecon: la aktiva partopreno de hinda junulara grupo en nia kongreso estis io aparte bonvena.

Vendredon matene, Drama Grupo de Studenta Esperanto-Klubo el Zagrebo (Jugoslavio) prezentis la teatraĵon *Gastamo* verkitan de Spomenka Štimec. Tiu teatraĵo estas preskaŭ terure vivrealeca: ĝi prezentas la situacion de internacia esperantista paro loĝanta en eŭropa ĉefurbo dum la turisma sezono, kiam senĉese sinanoncas vojaĝantaj esperantistoj, kiuj serĉas trankvilecon — aŭ loĝadon dum kelkaj tagoj! Gastoj, kies cigaredoj bruligas litaĵon, aŭ kiuj krokodilas, aŭ. . . La

teksto kaj prezentado estis spritaj, kaj agrable amuzaj estis ankaŭ la kantitaj komentarioj de Rene Matoušek. Kvankam verkita originale en la hungara (tradukita de Vilmos Benczik), ankaŭ *Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' profeto?* estas verko de esperantisto, János Elem. Ĝin prezentis (post premiero en la marta Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj, Budapeŝto), profesia trupo hungara, kies profesieco klare montriĝis per la lerta rolado kaj la trafikaj rekvizitoj. La teksto mem estis iom leĝera; se ĝi estis ankaŭ iom epizodeca, tio tamen havigis, dank' al la aktora lerteco, kelkajn trafikajn individuajn scenerojn. Tiel bona estis la nivelo de la aktorado, ke mi ne volas aparte distingi inter individuoj — krom eble menciis la infanan turiston, lerte kaj klarparole rolitan de juna Rikardo Horváth, kiu pruvis ankoraŭfoje la malnovan teatran proverbon: Neniam dividi scenejon kun infanoj aŭ bestoj! La teatraĵon oni prezentis dufoje; bedaŭrinde, en la dua la nudajn mamojn de la du "indiĝenaj" dancistinoj kaŝis grandegaj florgirlandoj: laŭdire pro cenzuremo de LKK, kio mirigas, se oni pripensas tion, kio estas facile spektebla en lokoj malpli ol cent metrojn for de la kongresejo! Oni komprenas, ke, el certa vidpunkto, teatraĵo prezentita de trupo profesia rajtas titoliĝi "kongresa ĉef-teatraĵo". Aliflanke, kiam la amatoroj atingas nivelon tiel altan kiel, ekzemple, la trupo "Tespa", ĉu tia titolo ne efikas finfine iom bombaste? Ĉu la valoro de la dramo prezentita ne ankaŭ kontribuas al eventuala ĉefeco de la prezento? Ĉu eble lasi, ke la publiko mem decidu pri atribuo de similaj titoloj? Se tio ŝajnas ĉikanema, mi petas pardonon; sed la alta kvalito de la diversaj programoj tra la semajno starigis al mi tiun penson.

William Auld

UNUA ĜENERALA KUNSIDO:

Procesio de opinioj


TIU TRADICIA ERO de la kongresa programo ĉi-foje estis aparte — kaj neatendite — vigla. La Estraro, kiu sidis sur la podio, surpriziĝis, ke 25 kongresanoj volis diskuti pri la sola ero de la tagordo — la Estrara Raporto pri la agado dum 1981. Kion diris la diskutantoj al proksimume 300 ĉeestantaj kongresanoj?

H. Tautorat (FR Germanio), kiu lastminute estis invitita "recenzi" la Raporton, menciis nur du ĝiajn temojn — la revuo kaj la delegita reto — kaj esprimis kontenton havi UEA kiel "ĉapelon", por poste efektive paradi per sia verda ĉapelo. Ronald (Kanado): Oni misuzas la delegitan reton kaj miskomprenas, ke ĝi servas por kontentigi strangajn turismajn dezirojn. Menabene (Italio): Oni maldungu la redaktoron de la revuo, ĉar li ne samopinias kun s-ro Menabene, kio estas grava novaĵo. Giloteaux (Francio): Necesas

junigi la delegitan reton kaj kontroli la lingvoscion de la delegitoj. Broccatelli (Italio): UEA havu respondeculojn kaj faru laborplanojn por unuopaj mondopartoj; la strategioj estu malsamaj, ĉar la cirkonstancoj estas tiaj. Klünder (FR Germanio) diris laŭdan frazon pri la revuo, sed alia germano (kies nomon ni ne kaptis) tuj mallaŭdis ĝin. Støp-Bowitz (Norvegio): Delegito ne estas honora titolo, sed tio devas esti laborpreta homo. Harry (Aŭstralio) gratulis la Estraron pro la bona laboro en 1981 kaj atentigis pri la ĝenoj, kiujn kaŭzas la ĉi-jara malfruo de la Jarlibro. Schmid (FR Germanio) pledis por reveno al la kongresnumeroj anstataŭ la ĉi-jaraj komputilaj kodoj. Krikke (Nederlando) defendis la redakcian politikon de la revuo. I. Tautorat (FR Germanio): Ni legas en la Raporto, ke la Komisiono pri Informado kunsidis, sed mankas informoj pri la laboro, kiun ĝi faris. Åberg (Svedio): Mankas nova Ĝenerala Regularo, por ke la individuaj membroj povu realigi la rajtojn, kiujn al ili donas la nova Statuto. Kolker (Soveta Unio): Oni havas la impreson, ke malantaŭ la agado de UEA staras grandega homa kaj mona maŝinaro. UEA lerte uzas siajn rimedojn. Tacconi (Italio): Ĉu la revuo povus publikigi raportojn pri la laboro de la landaj asocioj? Du Temple (Kanado): Nia landa asocio decidis kolektive aboni la revuon. Multaj detaloj en la organizo de la kongresoj estas plibonigeblaj. Simonnet (Francio): Aliĝintaj landaj asocioj estas UEA; en la Raporto mankas informoj pri ilia agado. Adôrno (Brazilo): Ne sufiĉas nur kongresi en Sud-Ameriko; en la tuta kontinento mankas funkcia libroservo. Bakker (Nederlando): Sveda klubo adoptis movadan grupon en Angolo; ĉu eblas imiti svedojn? Grzębowski (Pollando) pledis por kreo de komisiono pri la transpagaj problemoj. Dana kongresano: Necesas eldoni novan facilan revuon aŭ revivigi la iaman *La praktiko*.

Franca kongresano demandas ĉu la CO povus krei ian apartan servon por helpi la ĝemeliĝojn kun la triamondaj kluboj kaj unuopuloj.

Kompreneble, sekvis ankaŭ la respondoj de la estraranoj, same kiel la tuta kunsido komenciĝis per enkonduko de la ĝenerala sekretario de UEA. Sed el tio ni emas menciis nur la pledon, ke la membroj utiligu la adresaron de la Estraro, kiu aperas en ĉiu revunumero. Ĝenerale, temis pri unu el la plej sukcesaj debatoj pri la Estrara Raporto dum la lastaj jaroj.



Vidpunktoj el tri kontinentoj: Adôrno, Harry kaj Bakker.

Riĉa programo — ideo ripetinda

LA 66a UK en Brazilo faris rezolucion pri la neceso okazigi dum la estontaj Kongresoj tuttagan programon, kiu pritraktu la instruadon de Esperanto per prelegoj, seminarioj, modellecionoj kaj diskutoj pri modernaj instrumentoj. Baldur Ragnarsson, estrarano pri kulturo kaj edukado, komisiis al Hermann Behrmann (FR Germanio) kaj Zsuzsa Barcsay (Hungario) la organizon de la Tago de la Lernejo. La prezidanto de la Tago estis H. Behrmann, la sekretario Ernő Csíszár (Hungario). La programo okazis la 29an de julio de la 9a horo ĝis la 17h 30 kun mallonga tagmeza paŭzo. La interesiĝo estis grandega, kaj — kvankam okazis pluraj paralelaj aranĝoj — la salono tiel plena, ke oni devis ŝanĝi ĝin kontraŭ pli granda.

Du prelegoj koncernis la instruadon, unu la ekzamenojn. B. Ragnarsson emfazis en sia prelego, ke por la sukceso de la instruado/lernado ne povas respondi nur la metodo, ĉar la lernado de alia(j) lingvo(j) estas multe pli kompleksa afero. Nepre estas prikonsiderendaj ankaŭ la aĝo de la gelernantoj, la celoj de la lernado, psikologia sinteno de la lernanto, metalingvo de la instruado, organiza kadro, kompetento de la instruisto.

Zs. Barcsay koncentriĝis en sia prelego al tiu lasta faktoro — la kompetenteco: t.e. la edukiteco kaj daŭra perfektigo de la instruistoj/instruantoj. Ĉar kutime oni instruas Esperanton aldone al la normala laboro, do pluse, kaj ĉar la edukado de profesiaj E-instruistoj estas ankoraŭ tro limigita, estas bezonate, ke la kapabloj, spertuloj, profesiuloj, donu praktikan helpon al la "amatoroj". Tiajn spertojn volas kolekti, konservi kaj transdoni la ĵus aperinta libro *Metodiko en la praktiko*, (redaktita de Zs. Barcsay, verkita de 17 aŭtoroj el 10 landoj, eldonita de E-Centro Paderborn; 14,70 gld. ĉe la Libroservo de UEA).

La prelego de d-ro Werner Bormann (FR Germanio) prezentis la E-ekzamenojn kiel instigan celon de la lernado, kaj ampleksan superrigardon pri la ekzamenoblecoj tutmonde. Esprimiĝis la bezono havi kompareblecon inter la ekzamensistemoj (niveleoj, gradoj, postuloj, dokumentoj) de diversaj landoj. La Estraro de UEA jam traktas tiun demandon.

La prelegojn sekvis kvar modellecionoj, ege diverstipaj, interesaj. Grahame Leon-Smith (Britio) prezentis mallongan komputilan instruprogramon, kiu estis dum pluraj tagoj je la dispono de interesiĝantoj en la kongresa akceptejo. Laŭ liaj spertoj la komputilo servas al lernantoj por ekzerci sin en legado kaj kompreno. Ĉar la manipulado de la aparato mem estas interesa, la gelernantoj preskaŭ lude lernas per ĝi.

La aliaj tri modellecionoj ne aplikis teknikajn, almenaŭ ne elektronikajn, ili estis el tiu vidpunkto "tradiciaj": Zsuzsa Csíszár (Hungario) instruis al 10–12-jaraj lingve progresantaj infanoj, kiel esprimi daton en Esperanto. La instruhoro estis bone strukturita, ĝi havis personan rilaton kun la infanoj (komune festita naskiĝtago) kaj aplikis kelkajn lingvajn ludojn (kiuj trejnigis la memoron kaj kapablon konstrui frazon kaj krome vigligis la lecionon).

Claude Piron (Svislando) instruis studentojn surbaze de sia speciala lernolibro *Basic Esperanto Course*, en kiu "la radikoj kaj lingvaj strukturoj estas prezentitaj tiamaniere, ke ili ripetiĝas laŭ precizaj kalkuloj, je kalkulitaj interspacoj, por ke nur per tiu ripetiĝo mem ili



Edukado praktika kaj translima. Kelkaj anoj de la hinda pupteatro instruas la arton konstrui pupojn en la Infana Kongreseto (vidu paĝon 157).

fiksiĝu enmemore." La teksto de la libro estas cetere atentostreĉa krimromaneto el 24 ĉapitroj plus paralelaj tekstoj por ekzercado. Li aplikis krome flanelan tabulon por bildigi morfemojn, ekspluatante ilian konstantecon en Esperanto.

Audrey C.E. Childs-Mee (Nederlando) prezentis la unuan lecionon laŭ sia lernolibro *La baza kurso de Esperanto*, kiu baziĝas sur la Cseh-metodo. Ŝiaj kursanoj estis vere komencantaj plenaĝuloj, kiujn ŝi streĉe laborigis dum 40 minutoj por proprigi certan vortostokon kaj kelkajn strukturojn. Laŭ ŝia sperto la unuaj lecionoj estas la plej malfacilaj; poste la kursanoj havas jam sufiĉajn vortprovizon kaj strukturojn por kompreni klarigojn pri nekonataĵoj.

Dum la publika diskuto, gvidita de G. Leon-Smith, la partoprenantoj havis diversajn opiniojn pri la modellecionoj, sed ili ĉiuj konsentis pri tio, ke dum la venontaj Kongresoj oni devas okazigi similajn programojn, eble kun diversaj laborsekcioj; jam venis kelkaj tute konkretaj proponoj tiurilate. Dum kelkaj horoj en la akceptejo estis ekspoziciitaj nuntempe aĉeteblaj lernolibroj, gvidiloj kaj vortaroj el la Libroservo de UEA, entute 180 titoloj.

Zsuzsa Barcsay
Hermann Behrmann



Komitato kaj estrare

SESDEKO DA KOMITATANOJ de UEA partoprenis aŭ reprezentigis en la Ĝenerala Kunveno de la Komitato, kiel tio nomiĝas ekde 1980 laŭ la nova Statuto. Ĉi-jare ili daŭrigis kaj plibonigis la labormetodon enkondukitan unuafoje en Brazilio, nome laboro plejparte per formalaj resolucioj proponitaj de la diversaj komisionoj. Jam evidentiĝis, ke tiu metodo kondukas al multe pli klaraj kaj superrigardeblaj decidoj. Aliflanke sentiĝis ĉe multaj komitatanoj la manko ĝuste de tio, kio antaŭe ofte disipis la energiojn: ĝenerala debato. Tia debato ankoraŭ okazas, kiam temas pri la Estrara Raporto, sed tio ŝajne ne sufiĉas. Por iel kompensi tion, la Estraro nun proponas, ke la Komitato ĉiujare pridebatu unu ĉefan temon, krom la rutinaj tagordaj eroj. Venontjare tio estos la "5-jara laborplano de UEA".

La plej konkretaj rezultoj de la komitata laboro en Antverpeno estis jenaj: Regularo por la Elementa kaj

Rezolucio pri Turismo

La 67a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 24a ĝis la 31a de julio 1982 en Antverpeno kun 1899 reprezentantoj el 50 landoj

atentigas pri la rekomendo, entenita en la Manila Deklaracio pri monda turismo, ke estu kuraĝigita la lernado de lingvoj, "ĉefe de tiuj kun universala destino, kiel Esperanto", por faciligi la kontaktojn inter la vizitantaj turistoj kaj la vizitataj popoloj;

memorigas la servojn, kiujn Esperanto — pro siaj facileco kaj neŭtraleco — povas alporti al la internacia turismo, en la spirito de tutmonda alproksimiĝo, kiun elstarigas la Manila Deklaracio;

konstatas, ke Esperanto jam de pluraj jaroj estas utiligata de la ŝtataj kaj aliaj turismo-oficejoj por la turisma informado, ĉefe sub formo de eldono de filmoj, gvidlibroj, broŝuroj kaj afiŝoj en Esperanto;

esprimas la deziron, ke la ŝtatoj-partoprenantoj en la Monda Turisma Kunveno en Acapulco kuraĝigu la utiligon de la Internacia Lingvo por turismaj celoj.

Meza Ekzamenoj de UEA (por kiuj la Estraro jam nomis komisionon; nun restas elabori la studprogramon); aliĝoj de Kolombia Esperanto-Ligo, Universala Artista Ligo de Esperantistoj (UALE) kaj Universala Ligo; laborplano por la Monda Komunikado Jaro 1983; amendo de la Kongresa Regularo (simpligo de la kotiz-tarifoj); buĝeto de UEA por 1983; aprobo de la kontoj de la UK 1980; nomigo de tri novaj honoraj membroj. Decido pri la kontoj de UEA por 1981 estis prokrastita, ĝis estos ricevita la revizoraj raportoj pri la Centra Oficejo, la Grafika Centro Antverpeno kaj la Novjorka Oficejo.

Cetere, per dudeko da resolucioj la Komitato faris al la Estraro detalajn rekomendojn pri: eldono de "kulturgramoj", seminarioj por instruantoj, plurlingva lingvistika studo pri Esperanto, sindikata, olimpika, parlamenta kaj eŭropa agado, nealiancitaj landoj, aparta buĝeto por CED, kaj tiel plu.

La Estraro de UEA, intertempe, faris kuraĝan sed vanan provon likvidi sian vastan tagordon per apartaj kunsidoj antaŭ kaj post la Kongreso. Ĝi trovis sin devigita enprogramigi plian estraran kunsidon en la venonta januaro, kvankam tio kaŭzos buĝetajn kapdolorojn. El inter la punktoj, kiujn ĝi ja sukcesis trakti, ni menciuj, ke:

- la revuo *Kontakto* aperos venontjare per 6-foje 16 paĝoj (nun 4-foje 20), kun enhavo parte adaptita al la bezonoj de novaj lernantoj, laŭ la modelo de la pasintjara "facila numero" de ĉi tiu revuo,
- la Estraro serioze pristudas la invitojn de Pekino kaj de Brisbano por Universala Kongreso; kunlaboranto de Ĉina Esperanto-Ligo, s-ro Dai Song-en, eklaboris en aŭgusto en la Centra Oficejo interalie por spertiĝi pri kongresa organizado.
- la temo de la venonta UK en Budapeŝto estos: "Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado".
- la manuskripto de la nova *Esperanta Antologio* estas nun kompleta kaj ekkompostota; krome la Estraro decidis represi *Plena Analiza Gramatiko* kaj eldoni jaran volumon de Esperantologiaj studoj.
- la Novjorka Oficejo havas novan direktoron ekde septembro: s-ron Trefflé Mercier (el Kanado).
- la Estraro donis subvencion al Pupteatra Internacia Festivalo, aŭspicion al la scienc-teknika seminario okazonta en GDR kaj honorarion al volontulo en Zairio.

Demandoj por la akademio

LA NEPUBLIKAN kunsidon de la Akademio de Esperanto ĉeestis 18 akademianoj: nekutime granda nombro, inkluzive de la tuta estraro. Diskutitaj estis, krom administraj aferoj: landaj ekzamenoj, landnomoj kaj la centjara jubileo de Esperanto. En la publika kunveno, la Akademio akceptis skribitajn demandojn de la publiko pri lingvaj punktoj, kiujn respondis unuope aŭ plurope la akademianoj. La demandoj estis tre diversaj kaj ĝenerale interesaj. La publiko povis ankaŭ konstati, ke — antaŭvideble — la akademianoj ne ĉiam inter si konsentis pri kelkaj temoj.

Unua premio aljuĝita en ĉiu branĉo

KONKURSI entute 117 verkoj (poezio 30, prozo 25, teatraĵo 4, eseo 2, infanlibro 4, fotografio 52), el kiuj la juĝkomisiono premiis jenajn:

POEZIO: Unua premio: **Johan H. Rosbach** (Norvegio) pro *La portalo de Urnes*; Dua premio: **Timothy B. Carr** (Britio) pro *Rapsodio kimra*; Tria premio: **Johan H. Rosbach** pro *Eŭropa*.

PROZO: Unua premio: **Bernard Golden** (Hungario) pro *Delogado per krajono*; Dua premio: **Simone Boniol** (Francio) pro *Emberize via. . .*; Tria premio: **Eva Jelinková** (Ĉeĥoslovakio) pro *Reveno*; Laŭda mencio: **William Auld** (Britio) pro *Memoroj de hommanĝinto*.

TEATRAĴO: Unua premio: egale al **Bernard Golden** pro *Murdo laŭ romia maniero* kaj al **Martin Haase** (FR Germanio) pro *Ostracismo*. Dua kaj Tria premioj ne aljuĝitaj.

ESEO (Premio Luigi Minnaja): **Oldřich Kníchal** (Ĉeĥoslovakio) pro *La internacia lingvo – efektivoj kaj latentoj en la perado inter malproksimaj kulturoj*.

INFANLIBRA PREMIO: Egale al *Pesi elefanton*, eldonita de Ĉina Esperanto-Ligo, kaj al *La krabo kun oraj pinĉiloj*, eldonita de Esperantix (Francio).

NOVA TALENTO (Pokalo Harabaĝiu): **J.S. Veen** (Nederlando) pro la noveletoj *La lingvomaŝino* kaj *Neniam al hundo manĝigu fungojn*.

FOTOGRAFIO: Unua premio: **Bertil Danielsson** (Svedio) pro *La ĉevalo*; Dua premio: **Sally Phillips** (Britio) pro *Malvarma atendejo*; Tria premio: **Zoltán Fejér** (Hungario) pro *La aktorinoj en 'La aŭroroj ĉi tie estas silentaj'*; Laŭda mencio: **Bertil Danielsson** pro *Generacioj* (v. la paĝon 148).

Nova kultura fondaĵo

DUM LA KONGRESO estis anoncita la kreo de nova fondaĵo de UEA por kulturaj celoj, la fondaĵo "Antoni Grabowski". Tion ebligis promesita donaco de s-ro Adamo Pablo Goralski P. (Kanariaj Insuloj), en la sumo de 12 500 usonaj dolaroj.


Laŭ la deziroj de la donacanto, la fondaĵo estos uzata por ĉiujare premii kaj subvencii elstarajn kulturajn agadojn en Esperanto. Detaloj estos anoncitaj, post kiam la Estraro nomos juĝkomisionon kaj fiksis la ceterajn detalojn.

BELARTAJ KONKURSOJ 1982 ORIGINALA POEZIO: UNUA PREMIO

La portalo de Urnes

Altaj montoj turas,
pezaj, nigrebrovaj,
post la sunsubiro.
Ĉe la strand' senmovaj
fukoj naĝas mute.
Je brumeca lumo
sidas maljunulo
en olea fumo
el plektita meĉo.
Grizas liaj haroj.
Sed li majstras brile
dum fervoraj faroj
memfaritajn ilojn.
Leda antaŭtuko
kovras la genuojn.
Kun klinita nuko
tranĉas li karese,
ĉizas noblan lignon,
tuŝas sian bildon,
sentas ĝian dignon.

Liaj feroj tajlas
flato la konturojn
de la monstra drako,
kaj la fajnajn spurojn
de la akraj iloj
palpas delikate
kalaj fingropintoj,
dorloteme, glate.
La leono reĝa,
kiun ligno kaŝis,
vive kaj majeste
reliefe paŝis
jam el lia breto,
bildo pri la Bono,
kaptas ĉe la kolo
drakon sen mentono.
Sed la skvama besto
en serpenta tordo
toksas noblan sangon
per venena mordo.



La eterna lukto,
Bono kaj Barbaro,
Dio kaj Diablo,
pretas por altaro.
Kaj la olda viro
metas la ilaron
en la etan keston.
Finis li la faron.
Sed la lampa meĉo
nigre ekfumaĉas.

Super nigra akvo
vintra ŝtorm' ekkraĉas,
furiozas fukoj,
dum la maro tajdas,
super mornaj montoj
blanka luno rajdas.

Johan H. Rosbach
(Norvegio)

Esperanto-domo Antverpeno inaŭgurita

La UK en Antverpeno estis aparte konvena okazo por la festa inaŭguro de la nova "Esperanto-Domo" ĉe Frankrijklei 140. Cento da invititoj amasiĝis en la bela salono, kiun tie luas la jubileanta antverpena grupo "La Verda Stelo", por aŭskulti paroladetojn de Renato Corsetti, Grégoire Maertens, Ivo Durwael, Paul Peeraerts kaj aliaj. Likvida regalo konsolatis ilin pro la humida varmo.

La parolantoj rakontis, kiel Instituto Hodler '68 (jure memstara institucio starigita de UEA por investi kapitalon profite al la Movado) aĉetis fine de 1980 tiun domon, situantan tre centre, en la bela avenuo. Kvankam la domo estas strukture tre bonstata, ĝi estis longe neglektita kaj bezonis multege da laboro ripara kaj beliga, antaŭ ol ĝi ricevis la nunan allogan aspekton. Dank' al la entuziasma laboro de armeeto da volontuloj el "La Verda Stelo", tiu laborego povis efektiviĝi je la minimuma kosto. Pasintjare, en majo, jam okazis inaŭguro de unu etaĝo, en decembro povis enhejmiĝi tie la ĉefa luanto, nome la Grafika Centro de UEA, kaj nun eblis jam inaŭguri la tutan domon.

Kiel siatempe ankaŭ por la Domo de UEA en Roterdamo, pluraj malavaraj subtenantoj de Instituto Hodler jam simbole "aĉetis" ĉambron en la nova domo per donaco de po 10 000 guldenoj. Okaze de la inaŭguro, en la 30a de julio, la estraro de Instituto Hodler felice povis bonvenigi persone tri el la unuaj tiaj donacintoj: s-inon Elfriede Ernst (Belgio), s-inon Jenneke Dunnewold (Nederlando) kaj s-ron Adamo Goralski (Kanarioj). Laŭ la deziro de s-ino Dunnewold, unu ĉambro estas nomita, ne "ĉambro Dunnewold", sed "ĉambro Ramona van Dalsem", omaĝe al ŝi, kiu tiel kuraĝe kaj simpatie pioniris per originalaj kantoj en Esperanto, en kongresoj, en kluboj kaj sur diskoj.

La decido de s-ro Goralski, donaci por "ĉambro Goralski", estis farita dum la Kongreso mem. Lian ekzemplon sekvis ankoraŭ, nelonge post la Kongreso, "Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio", kiu tiel donos sian nomon al unu el tiuj ĉambroj, kiujn tiel vive plenigas la komerco kaj industrio de la Grafika Centro. Ankoraŭ plia persono anoncis la deziron "aĉeti" sian ĉambron venontjare.

La kreo de tiu impona movada centro en Antverpeno postulis de Instituto Hodler tre grandajn investojn sed aliflanke povas doni gravajn fruktojn, kaj loke kaj internacie. Pliaj donacoj por nomigo de ĉambroj, kiel ankaŭ aliaj donacoj aŭ pruntoj, estas tre bonvenaj kaj helpas krei novajn rimedojn por investoj kaj subvencioj.

SOLENA FERMO:

Mankis reĝisoro

DUM, unuflanke, la du grandaj solenaĵoj komence de la Kongreso akiras ĉiam pli kaj pli taŭgan formon, la Solena Fermo minacas, aliflanke, ampleksiĝi kaj malkoheriĝi ĝis nedigesteblo. En Antverpeno ĝi ja havis la kutimajn kortuŝecon kaj adiaŭan sentimentalecon, sed ĝi ankaŭ ŝajnis esti longega vico de senfinaj dankoj kaj amasa honorado de ĉiu ebla sindonemulo, komenante ĉe la peto ke ekstaru ĉiuj fakdelegitoj kaj delegitoj de UEA, kaj finante per alvoko, ke ĉiuj honoraj membroj kaj praaj kongresanoj el 1928 venu al la podio.

Nu, ni ne volas diri, ke dankoj ne okazu. Ni pledas, ke oni distingu inter vere dankindaj agoj kaj jam abunde pagitaj servoj. Ekzemple, kial tiu superflua danko al la kongresejo, kiu montriĝas esti unu el la plej multekostaj dum la lastaj jaroj? Ĉu eble pro tio, ke oni atentigis nin, ke ĝi fermiĝos tuj post la lasta programero, tiel ke ni apenaŭ sukcesis kolekti niajn aĵojn kaj tute maltrafis amikon, kiun ni planis renkonti post tiu programo?

En movado kiel la nia, kie preskaŭ ĉiuj laboroj plenumiĝas per bonvola kaj senpaga helpemo de la homoj, ĉiu unuopulo meritas ian dankon. Tamen, ni ne amasigu ĉiujn tiujn dankojn en unu granda poto, kiu no-

miĝas Solena Fermo. Tiel la dankoj kvazaŭ perdas sian valoron. Ĉar ni jam pasintjare en Brazilio dankis la delegitojn, ĉi-foje estis eble la vico de kursgvidantoj, kaj venontjare ni danku al la aĉetantoj de la Esperantaj libroj.

Vi ja komprenas, kial ni rezignas ĉi tie listigi la dankitojn el Antverpeno. Ili estis tiel multaj, ke ŝajnas pli facile kompili liston de tiuj, kiujn maltrafis danko. Krome, superfluas ankaŭ en la Fermo ripete prezenti la podianojn, ĉar oni jam faris tion en la Inaŭguro, en la Malfermo, en la Unua Ĝenerala Kunsido..., kaj temis pli-malpli pri samaj personoj. Entute, laŭ tiu malnova diraĵo, "por ke la Fermo estu solena, ne sufiĉas nomi ĝin tia". Ni urĝe bezonas spertan reĝisoron, kiu al niaj kongresaj solenaĵoj redonos la solenecon.

Du aferojn ni volas emfazi el la Solena Fermo en Antverpeno: UEA havas tri novajn honorajn membrojn: Giordano Azzi (Italio), Artur Bormann (FR Germanio) kaj Reto Rossetti (Britio). En nia oktobra numero vi trovos mallongajn biografiajn skizojn pri la tri novaj honoritoj. Solonecon al la Fermo donis la apero de Internacia Ĥoro, kiu jam duafoje (unue en Stokholmo) kreiĝas dum la Kongreso mem, diligente ekzercas tra la semajno, por fine regali nin per du bele interpretitaj kantoj, sub lerta gvido de la bulgara muzikisto D. Terziev.

Kompreneble, okazis ankaŭ la transdono de la Kongresa Flago, kiu nun vojas al la 68a UK, venontjare en Budapeŝto.

sm



19a INTERNACIA INFANA KONGRESETO:

Agrable en Keerbergen

TRIDEK GEKNABOJ el 10 landoj pasigis agrablan semajnon en la ĉi-jara Kongreseto, okazinta en Keerbergen, 25km for de Antverpeno. La infanoj estis ravitaj de tre riĉa programo. Krom la tradiciaj eroj, menciindaj estas la spektado de pup teatraĵoj el Hinda Unio kaj Hungario, kaj de vidbendo pri porinfana teatro en Ĉeĥoslovakio. Novaj estis ankaŭ konkurso pri ilustrado de rakonto kaj manlaboro per ŝnuroj.

Forte impresis miksiĝo kaj ludado kun vilaĝaj infanoj: la infanoj dividiĝis en kvin grupojn, tiel ke en ĉiu estis vilaĝaj etuloj, anoj de la Kongreseto kaj flandra esperantisto por interpreti; oni ludis en kvin ludejoj ĉirkaŭ la domo, kaj post 15 minutoj ŝanĝis la ejon. Ĉiu infano ricevis poentojn kaj premieton pro lerteco kaj rapideco. La kongresanetoj pasigis ankaŭ plezurajn posttagmezon kun la Junulargrupo el Keerbergen.

Iuj el la infanoj kontribuis al la 67a UK per partopreno en modela leciono (Tago de la Lernejo).

La Kongreseton vizitis la estro de loka mezlernejo, ges-roj Einihovici el Aŭstralio (kun salutparoloj de aŭstraliaj infanoj), ĉina kantistino, raportistoj de *Monato* kaj de Radio Pekino kaj pluraj belgaj ĵurnalistoj.

La sukceson de la Kongreseto oni ŝuldas al la talenta gvidado de Marie Grela, Rita Galmach kaj Agnes Moens (Belgio), Éva Haramach, ges-roj Zsuzsanna kaj Ernő Csiszar (Hungario) kaj la 15-jara Ines Frank (FR Germanio); kvankam Ines estis enskribita kiel simpla partoprenanto, ŝi helpis tre efike ĉe la junaj infanoj kiel animanto.

La kongresanetoj adiaŭis esperante revidi unu la alian en la venontjara kongreseto, kien, espereble, venos eĉ pli da infanoj el ĉiuj kontinentoj.

Dai Song-en

KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ:

Rolo de brajlo reliefigis

DE LA 3la de julio ĝis la 7a de aŭgusto, en Breda (Nederlando), okazis la 50a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE), kun 120 partoprenantoj el 18 landoj.

La vicurbestro de Breda, van Dun, ĉeestis la inaŭguron kaj faris salutparoladon. UEA sendis du reprezentantojn: P. Todorov, estrarano pri faka agado, kaj M. Lipari, el la komisiono pri handikapuloj. Ambaŭ emfazis la neceson kaj deziron, ke la kunlaboro estu ambaŭflanka, tiel ke ne nur UEA faru sian plejblon disponigi al Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) siajn gravajn dokumentojn en formo konvena por blinduloj, sed ankaŭ LIBE partoprenu en la komisionoj kaj aliaj laborformoj, por plifortigi la rilatojn kun UEA.

Okazis entute sep prelegoj, pluraj kun surbendigitaj ekzemploj. La prezidanto de LIBE, F. Karow (FR Germanio), prelegis pri "Niaj estintaj kaj estontaj IKBE-j". Plurajn prelegojn sekvis vigla diskuto.

La Kongreso aprobis kvar rezoluciojn: unu el ili rekomendas al brajlaj eldonejoj kaj presejoj observi la normojn de interpunkcio kaj nacilingvaj literoj en Esperanto-teksto; alia emfazas la esencan rolon de la brajla skribo por partopreno de la blinduloj en la socia kaj kultura vivo sur ĉiuj kampoj kaj proponis fari necesajn iniciatojn por unuecigi la brajlon internaciskale.

La partoprenantoj multe ĝuis ankaŭ dum la ekskursoj kaj arta vespero. La teatra trupo "La Kri-zalido" (Francio) ne nur prezentis *Ĉu dio bojas?*, sed ankaŭ surprizis la spektantojn per brajle skribitaj programoj. Ni listigu ĉi tie ankaŭ kelkajn aliajn erojn, kiuj estis inspiraj kaj imitindaj:

— Antaŭ la inaŭguro pastro Jelly Koopmans gvidis Ekumenan Diservon en Esperanto kaj disdonis la liturgian tekston en brajlo.

— Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj anoncis la surbendigon de la revuo *Esperanto* (ekde januaro 1983) kaj la preparon de simila distribuado de voĉlegitaj numeroj de *Heroldo de Esperanto* kaj *Monato*.

— La brajla eldono de *Plena analiza gramatiko* (12 dikaj volumoj) atingas la stadion de korektado de presprovaĵoj.

La partoprenantoj estis tre kontentaj pri la Kongreso, nomante ĝin "luksa kongreso en la mezo de Benelukso". Kun dankemo ili aprezis la valoran subtenon aŭ helpon de multaj instancoj, unuiĝoj, aŭtoritatuloj, internaciaj kaj landaj movadaj organizaĵoj kaj unuopaj esperantistoj. Ĉi tiu jubilea Kongreso estis komune preparita de Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj kaj Flandra Asocio de Blindaj Esperantistoj (Belgio).



Temoj por ĉies gusto

La dua, tamen neoficiala, temo de la Kongreso estis biero. La bierfarejo Stella Artois malavare akceptis



ĉiujn vizitemulojn, kaj montris ĉiujn erojn de la bierfarado. En la kongresa trinkejo estis vendataj ĉirkaŭ dudek malsamaj bierspecoj.

Partoprenis la kongreson 348 gejunuloj el ĉirkaŭ kvardek landoj, i. a. Burundio, Madagaskaro, Brazilo kaj Ĉinio. La ĉeesto de esperantistoj el tiel foraj landoj certe estis tre ĝojiga afero. Tamen restas la problemo pri nesufiĉa tutmondeco de TEJO. Unu paŝo survoje al plia tutmondiĝo estas la jam menciita eldonaĵo *TEJO tutmonde*. Alia ĝojiga informo estas, ke la Kongreso ricevis salutleteron de seminario aranĝita de junaj esperantistoj en Japanio kaj Koreo, kiu atestas pri la komenciĝanta kunlaboro inter la tieaj movadoj.

Leif Gunnar Nordenstorm

VESPERAJ ARANĜOJ:

Ĉiuj ja rolis tend-are

UNU EL la plej agrablaj partoj de la 38a IJK en Lovenio estis senkonteste la vesperaj programoj, kiuj elstaris pro sia varia kaj riĉa enhavo. Interese estas, ke ili okazis sub tendego, instalita sur herbejo, kio montrigis tre taŭga por krei etoson.

La **Flandra Foiro** (lunde) certe estis la plej originala kaj la plej ŝatata el tiuj programoj: la organizantoj dismetis tipajn, malnovajn flandrajn ludilojn sur la herbejo kaj organizis konkursojn inter la ĉeestantoj.

Bedaŭrinde, forta pluvo interrompis tiun amuziĝon, kaj oni devis rapide rifuĝi en la tendegon kaj konsoli sin per spektado (aŭ eventuale partopreno) de **kvizo**, sprite gvidita de Paul Peeraerts.

Ankaŭ la **Teatra Vespero** (merkrede) estis altnivela, kvankam pli serioza: la franca trupo "La Krizalido" (Arno kaj Solen Lagrange) prezentis la teatraĵon *Ĉu dio bojas?* de François Boyer. Ĝi unuavide povas ŝajni iom nebula, sed la talento de la geaktoroj certe kompensis tion.

La **Internacia Vespero** (ĵaŭde) estis tre diversnivela; aparte substrekindas la lasta ero: kataluna festo, dum kiu fajranta drako postkuris la ĉeestantojn sur la herbejo.

La **Varia Vespero** (marde) konsistis el tri senrilataj eroj: proklamo de la "verko de la jaro" (*La litomiŝla tombejo* de K. Piĉ) kun partopreno de Claude Piron (kiu profitis la okazon por prezenti siajn talentojn de kantisto); sinprezento de TEJO, kiu ĉi-jare konsistis el iom-post-ioma transiro al la podio de duono de la publiko (por pruvi, ke "TEJO estas ankaŭ vi" kaj ne nur la kutimaj podiuloj); kaj fine koncerto de Feri Floro, nove aperinta kantisto, kiu certe surprizis ĉiujn per sia granda talento kaj majstra gitarludado.

La **interkona kaj adiaŭa vesperoj** prezentis nenion aparte originalan: sed bona dancmuziko kaj biero kulture sufiĉas por certigi interkonatiĝon kaj mildigi adiaŭon.

Alain Dawson

Rezolucio pri la Internacia Jaro de la Junularo

La 67a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 24a ĝis la 31a de julio 1982 en Antverpeno kun 1899 reprezentantoj el 50 landoj, kun granda intereso kaj apogo,

notas, ke Unuiĝintaj Nacioj deklaris 1985 Internacia Jaro de la Junularo, konsciante ke ekzistas tuta serio de gravaj problemoj, kiujn nepre devas pritrakti la tuta socio koncerne la junularon;

konstatas, ke nuntempe en la socio la homaro troviĝas ĉe vojkruciĝo, en la senco ke la mondo fariĝas ĉiam pli integrita, kaj la ligoj inter la diversaj nacioj je ĉiuj niveloj fariĝas tiel intensaj, ke estas aparte grave eduki la junularon al kompreno de tiuj interrilatoj;

konscias, ke la teknika evoluo donas al la homaro la eblecon detrui sin mem;

samtempe **atentigas** pri la neceso pliprofundigi la kompreniĝon inter la generacioj, ĉar ĉiuj generacioj povos alporti siajn spertojn kaj lertojn;

substrekas la fundamentan bezonon krei kompreniĝon inter la nacioj kaj inter la kulturoj kaj subteni ĉiujn aktivecojn kondukantajn al paco kaj malarmado;

Pro tio **rekomendas** ke la studprogramoj en la lernejoj, universitatoj kaj aliaj klerigejoj aparte emfazu la edukon al respondeca uzo de la teknologio por la homa progreso kaj al interkompreniĝo kaj toleremo; oni unuflanke emfazu la samecon de la homoj kaj la komunajn atingojn de la civilizo, kaj aliflanke oni emfazu la kulturajn diferencojn ĉar ĝuste ili estas riĉaĵo de la nuna mondo kaj pro tio konservindaj por eviti teknologian homogenigon;

Fine **emfazas** la rolon de Esperanto en ĉio ĉi: unue kiel edukilo, ĉar ĝi kreas la kondiĉojn en kiuj vera kultura interkompreniĝo estas ebla kaj en kiuj la spirito de toleremo povas ekesti; due kiel komunikilo pri la problemoj mem, ĉar Esperanto formas idealan bazon por pridiskuti ĉi tiujn demandojn;

Tial ĝi **rekomendas** al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kunlabori kun la junulara sekcio de UEA — TEJO — kaj aliaj organizaĵoj Esperantaj kaj ne-Esperantaj en la realigo de la Internacia Jaro de la Junularo; kaj alvokas al UN, Unesko kaj aliaj organizaĵoj kunlaborantaj en la IJK praktike esplori la valoron de Esperanto en la internacia kompreniĝo inter la junularo.

Kongreseroj...

La tropika Antverpeno

Kvankam la vetero dum la kongresa semajno estis agrabla, tio ne multe sentiĝis ene de la kongresejo. Tie en kelkaj salonoj regis multe pli tropika varmo, ol pasintjare en Brazilo. Al la tropika etoso kontribuis ankaŭ la palmoj de la apuda Zoologia Ĝardeno, por eĉ ne paroli pri Lo Jacomo, kiu aperis en komitatkunsido vestita kiel gorilo. Oni ankoraŭ ne komprenas, kial li devis maski sin.

Libera Usono kaj socialisma Hungario

Kiam la promenanta mikrofono en la Malfermo atingis la usonan salutanton, tiu laŭte diris, ke li alportas al ni bondezirojn "el la libera lando Usono". Ni en la publiko grimace notis, ke tiuj vortoj dancas ĉe la rando de politika malneŭtraleco. Kelkajn momentojn poste, kiam la mikrofono venis al la hungara salutanto, la pesilo de la neŭtraleco denove ekvilibriĝis, ĉar ni aŭdis salutojn "el la socialisma Hungario".

Lasta rozo al Elsie

La prezidanto de UEA devis disdoni tiom da rozoj en la Solena Fermo, ke malfacile eblis anticipi taksu la ĝustan nombron de la floroj. Fine, unu el la belaj floroj montriĝis superflua, kaj Maertens direktiĝis al la unua vico en la salono, por transdoni la rozon al Elsie Parson, multjara fakdelegito en Bristol (Britio). Al la demando: "Kial mi?" la prezidanto respondis: "Ĉar estas la jaro de la pliaguloj". Ni povus aldoni, ke Elsie meritis la rozon interalie pro la fakto, ke ŝi estis unu el la plej dancemaj partoprenantoj de la Balo, spite al la proksimeco de ŝia 80a datreveno.


Speciala ĉambro por la Estraro

Ĝi estis perdita ie en la tria etaĝo, malantaŭ la scenejo de la granda salono. Tien la Estraro de UEA povis rifuĝi interkunvene, por kunveni aŭ ŝminki sin antaŭ rea apero sur la kongresaj scenejoj, ĉar la ĉambro normale servas kiel artista vestejo.

Aparte kurioza estis la plej "rekta" vojo al tiu ĉambro: necesis trairi necesojn en la teretaĝo. Ĉar temis pri vira ejo, ne estas klare kiel la virinaj membroj de la Estraro atingadis la kaŝan kunsidejon.

Dormu dolĉe!

La Kongresoj elĉerpas eĉ la ordinarnajn kongresanojn, por ne paroli pri la estraranoj, komitatanoj, membroj de LKK kaj — eĉ por ne menci la



Konstantan Kongresan Sekretarion, kiu devas esti je dispono pli-malpli senĉese dum la tuta kongresa semajno. Jen la nova KKS de UEA, Diccon Masterman, fotita ŝajne senpere post la Kongreso, meze de la tago, ĉu eble en ĝardeno restoracio, kien li venis por trinki sian unuan trankvilan kafon post la kongressemajnaj ŝtormoj. Li dormu dolĉe, li meritas ripozon!

Reciproka akuzo

"Kial vi ne venis al mia kunsido?", demandis Tonkin al Corsetti kaj la

samon ripetis Corsetti al Tonkin. "Dek tri homoj atendis vin", diris Renato. "Kaj vin dek kvar", aldonis Humphrey. Montriĝis, ke pro la lastmomenta ŝanĝo de la kunsidejo, okazis — samtempe — du kunsidoj pri la Jubilea Jaro. Unu estis gvidata de Tonkin (pro la foresto de Corsetti), la alia de Corsetti (pro la foresto de Tonkin).

Eksternaj rilatoj

Plurfoje dum la kongresaj kunsidoj menciĝis kvazaŭ nova fako en la laboro de UEA: "eksternaj rilatoj". La mencioj venis de la estrarano mem pri "eksternaj rilatoj", Humphrey Tonkin. Ne estas al ni klare de kie fontas ĉi tiu langa eraro. Ĉu "eksternaj rilatoj" simple analogas la internajn? Ĉu Tonkin emas ekstermi ion aŭ iun? Ĉu li komencas sterna siajn kontraŭulojn? Aŭ, ĉu ĉio ĉi estas ĝojkrio pro la fakto, ke li en Antverpeno ne devis terni, ĉar forestis lia kutima kongresa nazkataro?

Sovaĝa kato en koncerto

Meze en la programo de la Muzika Vespero sur la granda scenejo de la ĉefa kongresa salono aperis — sovaĝa kato. Ĝi iom ĝuis la surprizan alĝapon de preskaŭ du mil homoj, antaŭ ol delikate forvagi inter la kulisojn. Montriĝis poste, ke temas pri fuĝinto el unu el la kaĝoj de la Zoologia Ĝardeno, kies oficuloj jam de kelkaj tagoj malsukcese serĉis la vagabondon.



Eksaj kongresaj sekretarioj apartenas al la plej raraj partoprenantoj de la Universalaj Kongresoj. Kiam vi laste vidis en UKoj: Stuttard, Pompilio, Nevan? (Pri Power ni demandos vin post kelkaj jaroj.) Jen tamen unu de tiu specio, Gian Carlo Fighiera (dekstre), post tagmanĝo kun la prezidanto de UEA en Antverpeno. Fighiera, kiu nun estas funkciulo de Monda Organizo pri Turismo en Madrido, kaptis la okazon por kiel malnova kunlaboranto kaj dumviva membro de UEA pridiskuti kelkajn aktualaĵojn kun la prezidanto Maertens.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacia respondkupono). Pri la enhavo de la anoncetoj ne respondecas la redakcio.

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Petu informilon!

Leteresperon organizos komence de novembro Esperanto-grupo en Wriezen. Atendas leterojn, b.k. el tuta mondo. Resp. per bele afr. b.k.: Esperanto-societo en KL, Loka estraro, DDR-1313 Wriezen, Germana DR.

"Monda kampanjo por pli-vastigi nian movadon." Broŝuro 64-paĝa. Aŭfrankite: 22 francaj frankoj, ĉe s-ro André Grossmann, 5 rue des Pyrénées, F-68390 Baldersheim. Poŝtkonto: 819.34 U Strasbourg.

Kiel diri? (Lentaigne). Mimeo. 5 000 zamenhofaj esprimoj pri 67 temoj. "Vera trezoro!" 9 gld. ĉe UEA. Nepre havinda.

Yvette Vierende (5 rue docteur Roux, F-34000 Montpellier) korege dankas la pli ol 250 esperantistojn el 28 landoj kiuj sendis al ŝi amikajn salutojn. Ŝi, nun, estas en alia reedukejo, sed esperas, dank' al rulseĝo, baldaŭ redeĵori. Pro la nombro kaj la manko de kuraĝo ŝi ne povas respondi al ĉiuj kaj petas senkulpigon.

Verkiĝis preĝlibreto originale en Esperanto. Neniam tradukiĝos la libreto en alian lingvon. Mendebla kontraŭ 5 internaciaj respondkuponoj ĉe Reĝo Parzival, Juravorstadt 13, CH-2502 Biel, Svislando. Tel. (032) 23 15 80.

Adresŝanĝo: Reto Rossetti avizas geamikojn, ke li faris feliĉe sian lastan (surteran!) translokiĝon al 2 Elmwood Crescent, Luton, Anglio, LU2 7HX. Telefono: (0582) 34385. Skriboj al eksadreso en Gloucester transvenos aŭtomate.

Ĉe-metode instruadu ankaŭ vi, private aŭ lerneje, laŭ: *Esperanto laŭ la patrina metodo*, 320 paĝoj GM 50,00! 50-instruhora kabareto lernigas esperante kaj germane ĉiujn demandojn kaj respondojn de la ĉiutaga konversacio! August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61, poŝtgironto Hamburg 150 58-209.

Pri internacia pacdevigo volas korespondi John C. Lincoln, 3320 East Weldon, Phoenix, Arizona 85018, Usono.

Eldonejo -librejo SONORILO

L'espéranto dans l'enseignement, d-ro Pol Denoël. Ĵus aperis la dua eldono! 24p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj instruado. Prezo: 100 Bfr.

Initiation théorique et pratique, d-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Bind. Gramatika lernolibro kun bonaj klarigoj pri gramatikaj konceptoj. Lernolibro plej taŭga por publikaj kursoj! Prezo: 180 Bfr.

Gluaĵo: Internacia lingvo Esperanto: Ĵus aperis! Prezo: 25 Bfr.

Kartoj por la Nova Jaro: Serio de 4 diversaj koloraj kartoj en 5 lingvoj (kun kovertoj). Prezo: 60 Bfr.

Eldonejo-Librejo SONORILO estas peranto i.a. de: *Heroldo de Esperanto* (Bfr.520); *El popola Ĉinio*. (1 jaro: Bfr.180, 2 jaroj: Bfr.300, 3 jaroj: Bfr.420); *Monato* (Bfr.960).

Librejo SONORILO vendas pli-malpli ĉion momente disponeblan en la Esperanta libromarkato! Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 100 gld. – 20%, por la mendoj super 100 gld. – 10%. Niajn eldonaĵojn vi povas mendi ĉe la Libro servo de UEA, ĉe via kutima libro servo, aŭ rekte ĉe: Eldonejo-Librejo SONORILO, Doornstraat 22, B-2610 WILRIJK, Belgio.

Aperis libro de D-RO RUBEN FELDMAN-GONZALEZ, prezidinto de Argentina Esperantista Junulara Organizo kaj fondinto de Pasporta Servo de TEJO:

LA NOVA PARADIGMO EN PSIKOLOGIO (Eldonis: Paidos, Buenos Aires; hispanlingva; 222-paĝa).

En tiu verko, d-ro Feldman-González traktas pri observado laŭ difinita abstrakt-nivelo. La studo kombinas, laŭ nova vidpunkto, psikologion, fizikon kaj neŭrologion, reorganizante konatajn modelojn de la homa menso. Novaj direktoj por psikologio kaj psikoterapeŭtiko estas proponataj.

La libro estis verkita dum kvin jaroj (1975-80) da universitataj prelegoj kaj kolokvoj en 14 landoj (Usono, Eŭropo kaj Latin-Ameriko).

La verko, interalie, pritraktas konversaciojn kun la fizikisto prof. David Bohm (Universitato de Londono), kreinto de la koncepto "holokineso" (tutmovo) kaj disĉiplo de Albert Einstein, kaj kun prof. Karl Pribram (Stanford, Kalifornio, Usono), kreinto de la "holografia memor-modelo". La aŭtoro kontaktis ankaŭ Jiddu Krishnamurti (edukisto) dum la libroverkado, plurfoje inter 1975-81.

Tiuj, kiuj interesiĝas pri traduko de ĉi tiu grava verko en Esperanton, kontaktu la aŭtoron: Rubén Feldman-González, Director Child Psychiatry, 1100 W. Lacey, Hanford, CA 93230, Usono.

Subtenu la tutmondigon de Esperanto per donaco al la Fondaĵo Azio-Afriko ĉe la CO de UEA

Fondaĵo Azio-Afriko

MOHAMMAD AL-SABAH &
MOHAMMAD SA'AD TRADING
& CONSTRUCTION COMPANY,
P.O.B. 5618 SAFAT, KUAJTO.
TELEKSO: 23671 DATACOM KT.
TELEFONOJ: 418556, 418558,
443229.

- OKUPIĜAS PRI: INTERNACIA KOMERCO, INTERNACIA TRANSPORTO, CIVILA KONSTRUADO, KOMERCA INFORMADO PRI LA MERKATOJ EN LA GOLF-REGIONO.
- APERTA AL BONAJ IDEOJ PRI TERKULTIVADO KAJ INDUSTRIIGADO EN NIA REGIONO, KIUJ POVAS PROMOCII PLI BONAJN RILATOJN INTER LA ORIENTO KAJ LA OKCIDENTO.

شركة محمد الصباح ومحمد سعد للتجارة والمقاولات
Mohamad Al - Sabah & Mohamad Sa'ad Trad. Cont. Co
الكويت — KUWAIT

LA CENTRA OFICEJO DE UEA

serĉas novan oficiston

precipe por la financa administrado de la Asocio. Taskoj inkluzivas planadon kaj buĝetadon, pretigon de spezokontoj kaj bilancoj, gvidadon kaj kontrolon de kontumado (inkluzive de la alilandaj oficejoj), rilatojn kun bankoj kaj similaj instancoj, investadon de la kapitalo, kalkuladon de salajroj, impostoj, asekurkotizoj kaj rento kaj korespondadon pri financo kaj kontoj.

Spertoj kun diversvaluta kontumado kaj kun komputilaj sistemoj kaj scipovo de la nederlanda lingvo estas avantaĝoj.

Salajronivelo inter 30 000 kaj 36 000 gld. jare malnete. Eklaboro en Roterdamo prefere frue en 1983.

Interesitoj bv. skribi al la ĝenerala direktoro, UEA, Nw. Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam aŭ telefoni al (010) 36 15 39.

PRI INTERNACIA LINGVO DUM JARCENTOJ

Kompilis mag. Isaj Dratwer

Eldiroj de filozofoj, verkistoj, sciencistoj, lingvistoj kaj aliaj pri Esperanto kaj la internacilingva ideo. "La tre valora verko de Mag. Dratwer devas esti rigardata kiel suplemento al tiu ĉi libro." (El la antaŭparolo de *Esperanto en perspektivo*.) Dua eld. (1977), konsiderinde ampleksigita kaj ĝisdatigita. 360p. Prezo: 30,00 guldenoj. Ĉefa distribuanto: Libro servo de Universala Esperanto-Asocio.

"Niaj grup-kunvenoj estas tedaj, tial mi ne plu vizitas ilin." Certe vi konas tiajn kaj similajn plendojn. Nu, vi ja ne tuj devas fondi — kiel oni faris en japana urbo Nagojo — monatan rondon AMIKARO DE MONATO, sed ankaŭ vi povas profiti el la riĉa materialo, kiun enhavas MONATO, por vigligi viajn kunvenojn. Neniam mankos temoj por preparoli, diskuti, aktivigi.

Se ankaŭ vi volas savi viajn grup-kunvenojn, petu varb-materialon ĉe: Eldonejo TK/Stafeto, Miksebaan 65 A, B-3130 Brasschaat, Belgio.

MONATO

internacia magazino sendependa

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj plus poŝkalendaro jare. Jarabono 59,50 gmk aŭ 960 bfr. La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/Stafeto p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio — aŭ mendu ĉe landa peranto aŭ UEA (64,00 gld.; por Nederlando 66,56 gld.). Petu provekzempleron kontraŭ du int. respondkuponoj. (Tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton.)

Ĝus aperis ĉe 'Arion' unua disko en Esperanto. Kantisto estas Max Roy Carrouges. Tekstoj kontrolitaj de Roger Bernard. Vendoprezo: 425 Bfr. Mendu vian diskon rekte ĉe **Eldonejo & Librejo Sonorilo**. Ni donas kutiman rabaton al ĉiu revendisto (aliaj libroservoj kaj unuopuloj), kiu samtempe mendas minimume 5 diskojn *Esperanto kaj libereco*, kondiĉe ke ili estu ekspedotaj samtempe al la sama adreso. Al la sumo aldoniĝas kiel kutime la sendokostoj: vidu nian anoncon sur la antaŭa paĝo. Mendu tuj ĉe **Eldonejo & Librejo Sonorilo**, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk, Belgio, ĉe la Libro servo de UEA aŭ ĉe via kutima libro servo.

ESPERANTO kaj LIBERECO